

eLIBRO

Frederiko Karinthy

Norda vento

I N K O

Frederiko Karinthy

NORDA VENTO

El la hungara tradukis Karlo Bodó

Lingve reviziita en 2003

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-186-0

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JANUARO 2003

Enhavo

Norda vento	4
Renkonto kun junulo	12
Novelo pri la magneta morto	20
Genius	31
Cezaro kaj Abu Kair	39
Senespera amo	48
Barabbas	59
Delonge	63
La unua almozpeto	68
Virhonor	75
Anasrostaĵo	81
Ŝminko	87
Korpa beleco	92

Norda vento

I.

Antaŭ longe, kiam mi ankoraŭ vivis sur la tero, mi songis ĉi tion.

La somero estis jam je sia fino: ĉiu varmego kaj lumo, kiu kolektiĝis dum monatoj, ŝvelis je gusto, ruĝo, sukerasuko en la fruktoj, en la spireganta pulmo de la tero. Dismoliĝis la pezaj bananoj, kaj la ŝelo de la orangoj ruĝiĝis, kaj la verdo de la palmoj jam preskaŭ blindigis. Ankaŭ la homoj maturiĝis kiel la fruktoj. Antaŭ la vespero, kiam ni levis la ŝultrojn el la maro kvazaŭ ruĝebakitaj bulkegoj aŭ bruligitaj mespiloj estus naĝintaj sur la akvo, nia haŭto bruniĝis, kaj niaj okuloj brilis.

Estis grandioza, pagana somero, kaj ĝi daŭris almenaŭ dudek jarojn. En la areno ni aranĝis olimpajn konkursojn, nudaj knaboj luktis, kaj persaj virinoj dancis je la fino, — ni ĉiuj estis junaj, kaj ni preskaŭ ĉiuj estis enamiĝintaj unu al la alia. La abundan, spicitan grason de la festenoj ni glutlavis per ebriigaj vinoj, — post noktomezo, kun fiera kaj pulsanta kapo, ni komponis kantojn kaj verkis fabelojn. Ni prikantis la sinon kaj kokson de la virinoj, kaj ni trovis mirigajn komparojn inter la virinoj, fruktoj, floroj, velurhaŭtaj katspecoj kaj trinkaĵoj.

La bela komparo faris nin efektive ebriaj, kaj febrigis nin neatenditaj kaj mole sonantaj rimoj: poeton ni tiam ova-ciis kriegante kaj per galopantaj vortoj, — kelkfoje eĉ per pli bela komparo ni laŭdis la verkon, ol per kiaj la poeto ornamis ĝin.

Ankaŭ dramojn ni ludis, en kiuj mallumaj pasioj eksplodis libere, kaj la simboloj estis same karno kaj sango, kiel la homoj. Por ĉi tiuj dramoj itala muzikisto verkis interludon, — senlima sopiro estis en la muziko, malespera, neestingebla deziro: el la orkestro kvazaŭ etendiĝis konvulsiaj brakoj, por kapti la flirtantajjn harojn de iu bruna knabino. Multfoje mi sufoke ploregis pro ĉi tiu muziko, ĉar mi estis enamiĝinta al Lolla, kiun amis ankaŭ la itala muzikisto, kaj plej multe mi tiel estus povinta ŝin ami, se mi estus povinta morti antaŭ ŝiaj piedoj.

Ni ne timis la morton. La enterigojn sekvis orgioj, kaj ni ne levis tombmonumentojn. Pri la morto ni rememoris nur elfluantan kaj pulsantan sangon, nenion pli. Oni parolis pri grafino, kiu kontentigis en senekzempla kaj korfrostiga maniero siajn amdezirojn: inter ŝiaj viktimoj estis ankaŭ infanoj kaj junaj knabinoj; pri ĉi tiu virino ni pensis ofte kaj langvore. La korton de imperiestro Aŭgusto ni ofte vizitis kaj babilis kun la maljuna Meceno. Iom da tempo Cezaro Borgia estis nia idealo, — poste ni fariĝis pli rafinitaj, ni aranĝis paŝtisludojn en la Versailles-a parko. Poste la amo de Duse kaj D'Annunzio inci-

tis nin, niaj epitetoj fariĝis pli kaj pli brilaj, kaj iu el ni verkis teatraĵon el la danco de Salomo. Kaj dume, la tutan someron, blindige brilis la suno, la Kvarnero fajreris kaj brulis kiel diamanto, supren, ĝis la Alpoj, varmega fariĝis la tero, kaj en la danaj akvoj ni vidis ĝin droni: plue nin ne tre interesis, kio estas. Estis belega somero, kaj konstante blua estis la ĉielo. Iun posttagmezon aperis la fremdulo.

II.

Posttagmeze mi boatis kun Lolla. Varmega kaj larma mi estis: pri la mortanta somero kaj la mortanta juneco mi parolis, multajn kolorojn mi miksis en la vortojn, ĉar sur la transa bordo de la lago miksiĝis flava, ruĝa kaj blua koloroj en la verdon de la arboj, kaj mi sidis kontraŭ tiuj ĉi arboj. Sed miaj vortoj kaj koloroj elĉerpiĝis, kaj kiam mi ne plu povis paroli, Lolla enue kliniĝis el la boato kaj freŝiĝis siajn fingrojn. Mi enpenŝiĝis, kiu instrumento povus soni anstataŭ mi, sed nur sopiraj melodioj venis en mian kapon, kaj en ĉiuj estis nur la sama sopiro, pri kiu mi povis paroli. Mi elĉerpiĝis, kaj tiam ekestis ĝena, stulta malpleno.

Ni reiris en la hotelon. En la ĝardeno tensesis junaj knabinoj, la halo estis plena, sed mi estis laca kaj premi-

ta, mi ne eniris. La pordisto staris ekstere antaŭ la pordego kaj parolis kun fremda junulo. Mi vidis, ke ili ne komprenas unu la alian. Mi aliris ilin. Blonda, bluokula, sensignifa junulo li estis, norveglingve li parolis. Mi alparolis lin france. Mi donis al li klarigon, kaj iel ni ankaŭ restis kune.

Ĉe la vespermanĝo ni jam pliintimiĝis. Tiam mi rimarkis, ke mi eraris: ne bluajn okulojn li havis, sed grizajn, kaj almenaŭ unu kapon li estis pli alta, ol kiel mi vidis en la unua momento. Pri tio mi iom miris, sed poste cini ke mi ŝultrolevis. Tre malmulte li parolis. Tiam ni kva-zaŭ ne plu estus sur la insulo Capri, sed en iu germana haveno, eble en la proksimo de Hamburgo, en banurbo. En mia enuo ankaŭ al li mi komencis paroli pri Lolla, iom post iom mi varmiĝis, miaj brilaj vortoj revenis, ŝvelis, ĉiam pli varmega kaj pulsanta refariĝis mia parolo, fine ĝi tute transiris en melodiojn, mi kantis, kantante mi klarigis al li, kion mi sentas, kaj mi eĉ ploris. Subite mi eksilentis por esplori la efekton. Mi esperis, ke li almenaŭ larmos. Sed la norvego nun denove estis tute alia, longajn, blue-grizajn harojn li havis, kiuj strange flagris ĉirkaŭ lia kapo kiel malvarma, blua flamo de alkoholo aŭ erarlumo sur la surfaco de malvarmaj, humidaj lagoj. Kaj lia vizaĝo tute longiĝis, du metrojn longan vizaĝon li havis, en disflujaj konturoj, li ne rigardis al mi, nek respondis. Sed kiam mi pli atente observis lin, mi

aŭdis, ke tute mallaŭte, kvazaŭ al si mem, li zumkantas aŭ ion fajfas. Ŝajnis, ke li fajfas tra la dentoj, ĉar lia vizaĝo dume ne moviĝis, — elinterne venis ĉi tiu trenata, fantoma voĉo, al kiu similan mi neniam aŭdis. La fajfado fariĝis ĉiam pli akra kaj tranĉa: io frapis mian vizaĝon. Subite trafulmis min, ke verŝajne ĉi tiu homo estas ventroparolisto, tio ne estis homa voĉo, ĝi ne venis el gorgo. Mi ekfrostetremis kaj petis lin, ke li ne faru tion, ĉar tio min nervozigas. Je tie li komencis senĝene kaj facile babili, sed subite horore mi rimarkis, ke dum li parolas, li ne ĉesigas tiun ĉi fantoman fajfadon, kiu obtuze kaj profunde muĝis en li sur la fundo de la vortoj. Ventroparolisto, mi trankviligis min, sed mi sentis, ke mi paliĝas.

Poste mi proponis al li, ke mi prezentu lin al Lolla. Kiam li parolis kun Lolla, li estis denove tute sensignifa junulo, ĝentile li respondis, sed restis indiferenta. Estis strange nur, ke unu flanko de li estis lumigata de verdeta lumo: dum momento ŝajnis, ke sur tiu flanko li havas kvin aŭ ses brakojn, sed mi ne vidis tion klare, kaj tiuj nebulaj korpopartoj subite disfluis.

Poste scivole mi demandis lin, kion li opinias pri Lolla: ĉu konvenas por ŝi tiu arda ario, kiun mi verkis je ŝia honoro kaj ludis per fortepiano. Ĝentile, sed malvarme li laŭdis ĝin. Subite mi konfuzite rimarkis, ke mi tedas lin. Laŭte mi parolis, gestis al li, kaj tiam mi rimarkis, ke

li ne sidas sur la flanko, kien mi parolas: — mi turnis min, kaj li staris post mia dorso kaj laŭte, sovaĝe li ekridis. Mi ekhontis. Nun denove estiĝis silente, sed tion mi ne povis elteni: peza premo eksidis sur mia brusto. Penege mi serĉis vortojn: mi demandis lin, kiun li amas, kaj ĉu li scias kanti? Tiam trankvile kaj firme li deklaris, ke lia amatino atendas lin sur la norda poluso, li ankoraŭ ne vidas ŝin klare tra la nebulo, sed lia koro, mallarĝa kaj fleksiĝema ferpeco, konstante montras en tiun direkton per sia pintiĝinta fino, kiel kompasoj, kaj se foje tiu eta fersplito liberiĝos el lia korpo, ĝi kuros tra nebulo kaj akvo al tiu magnetika punkto. Ankaŭ kanti li kutimis: — kaj tiam mi denove aŭdis tiun dorsfrostigan muzikon, la fajfon, kun ĝia monotona ritmo. Muziko ĝi estis, senfine fleksiĝema kaj alte ŝvebanta: — sed kiam mi provis fiksi ĝin en mi, klariĝis, ke per muziknotoj de la kromatika skalo ne estas eble ĝin esprimi kaj sekve instrumentoj neniam povos ĝin reludi. Tiam mi rekonis, ke la norvego estas frenezulo. Jam vesperiĝis. Mi ne povis vidi lian vizaĝon, sed mi sentis, ke ankaŭ mi frezeziĝus, se mi nun vidus ĝin. Jen de proksime, jen de malproksime mi aŭdis lian voĉon, la norvego spiregis, senbride ĵetis sin, kaj liaj brakoj, per kiuj li batis la takton, estis eble eĉ mil metrojn longaj, kiam sur la nigriĝanta ĉielo li svingis ilin. Mi provis lin silentigi, mi diris, ke fine nepre li renkontos sian amatinon, li havos ŝin, kaj li povos ŝin por-

ti sur la insulon Capri. Nun fine li serioze respondis al mi: superhoma doloro estis en lia voĉo. Li diris, ke neniam li povos porti sian amatinon sur la insulon Capri, — ke lia amatino mortis antaŭ longe, sed ie, iam li tamen vidos ŝin, ĉu ŝin, ĉu ŝian ombron, — se ne ĉi tie, do eble inter la mortintoj, — haliho, haliho! — kiam cindriĝos la Tero kaj estingiĝos la Suno, — en la fajfanta mallumo de la tombejo — haliho! . . . inter tombokrucoj palpante li serĉos tiun, kiun la lumo faris nevidebla. Kaj kiam mi trankviligis lin, li komencis furiozi kaj ĵetadis sin kiel la maro, — mi ne plu eltenas, li fajfis, mi ne eltenas ĉi tiun sufokan varmon, ĉi tiun grason, ĉi tiun inerton, ĉi tiujn multajn stultajn tagojn kaj ŝvelintajn fruktojn. Kaj kiam li diris tion, io komencis siblegi en miaj haroj, tiel terura timo min kaptis, ke mi svenis.

III.

La postan tagon, kiam mi rigardis tra la fenestro, malvarm-nigra estis la ĉielo kaj malantaŭ la montoj la norda vento. Turniĝante ĝi kuris tra la stratoj, tranĉis rimenon el la aero kaj ŝiris tegmentojn de la domoj, tiel ke ili blekis pro tio. La arboj kliniĝis ĝistere, kaj en la aero turniĝis la ruboj de la tero. Ĝi fortrenis ĉifonojn de virinaj vualoj, la palisoj grincis. Transe la akvo de la lago

mallumis kaj taŭziĝis, kelkloke falintaj veloj tranĉis la akvokrestojn. La vojon, kie terurite kaj dentklake mi kuris hejmen, ĉirkaŭvolvinte mian kolon per mia konvulsia surtuto, la vojon kovris forbalaitaj, maturaj figoj, — la vento balais la fruktojn, ili kuris antaŭ mi, kvazaŭ ĉiu el ili estus ekviviĝinta, kaj nun veante, blekante ili pentus, ke tiel longe ili dormis.

Mi, levis la manojn, petis indulgon, mia surtuto flagregis ĉirkaŭ mia kapo, — kaj tiam alte, alte super mia kapo, inter du kuregantaj nuboj mi aŭdis, ke fajfas la norda vento, — ĝi fajfis kaj ridaĉis, kaj mi rekonis la fantoman muzikon, kiun hieraŭ mi aŭdis en la laŭbo de la hotelo.

La norda vento tempestis kaj furiozis en la kloŝo de la firmamento; kaj la densaj, molaj kaj nigraj nuboj estis nun kvazaŭ drapiritaj muroj de giganta ĉelo, kiujn bruegante ŝiras, per pugnoj kaj kapo frapegas en sia trudkitelo la frenezulo, la norda vento.

Renkonto kun junulo

Gaja mi estis, multe mi forgesis, kun skrupula zorge-
mo mi ekbruligis cigaron, kaj ni ekiris la bulvardon.
Mia bela kaj kara edzino ridetis al mi el sub la vualo, mia
bela amatino, kiu amis min kaj permesis, ke mi ŝin amu.

La junulon mi renkontis sur la bordo de Danubo, ĉir-
kaŭ la sesa horo. Li preteriris nin, jam krepuskis tiam, mi
lin ne rimarkis. Li jam foriris eble dudek paŝojn, kiam
mi, turnante min, ekvidis lin. Subite mi eksilentis kaj
atakis min konfuza maltrankvilo. La svelta talio akre de-
segniĝis en la fono de ŝargata ŝipo, tamen, mi kredas,
pro liaj paŝoj mi rekonis lin. Iom eluzita estis la vesto. En
la mano li portis larĝan kajeron. Dekok- aŭ nur deksep-
jara li estas eble . . . mi ankoraŭ hezitis, ne kuraĝis kredi
. . . volis min forturni, sed subite akra tranĉo baraktis
tra mia koro, kaj poste tiel arda batado kaptis ĝin, ke mi
devis halti. Unu lian movon mi vidis, kiel li levis la ma-
non kaj tenis ĝin antaŭ si, ho ve, terure, jen la mano, eĉ
la tranĉon mi rekonis sur ĝi, kiun en la gimnastikejo . . .

Mia edzino mirante rigardis min, kaj mi balbute diris:
"Bonvolu . . . atendu min . . . mi devas paroli kun ĉi
tiu junulo . . ."

Kaj mi lasis ŝin tie kaj antaŭenrapidis. Baldaŭ poste mi malrapidigis la paŝojn. Jam vesperiĝis. La junulo ne returnis sin. Li sciis, ke mi estas malantaŭ li. Trankvile li pluiris, ĉe ŝipŝnuro li trankvle haltis kaj turnis sin al la silenta Danubo kaj rigardis transen, al la montoj. Mi estis en terura embaraso kaj akriĝis la gorĝon. Mi ekstaris apud li por rimarkigi min. Ŝtele mi rigardis lian buŝon, kiu ankoraŭ estis pli juna kaj pli mallarĝa ol la mia. La okuloj estis pli grandaj kaj pli helaj. Ho, estis li. Kaj la kajero en lia mano, la malnova kajero . . . kiun mi metis sur fundon de ŝranko kaj forgesis. Peza, premanta incitiĝo estis ĉi tio.

”Ĉu do . . . vi ne vidas min? . . .” fine mi diris mallaŭte.

”Jes ja,” li diris, sed li ne turnis sin al mi.

Embarasite mi silentis. Poste mi ekhontis. Ridinde. Dekokjara junulo! La renkonto estas stranga, sed mi devas trovi la voĉon. Mi estos senĝena. Li ĝoju, ke li havis okazon min vidi.

”Mi tuj rekonis vin,” mi diris laŭte, ”kiam vi preteriris min.”

”Mi scias,” li diris.

”Sed kial vi ne venis tien? Ĉu vi ne estas scivola pri mi?”

Li ne respondis. Mi nervoziĝis.

”Bone, mi scias, kiel retenema kaj fierega vi estas. Sed rigardu, tio ne havas sencon . . . KREDU, mi rekonis, nenian sencon . . . Mi klarigos al vi . . . Ankaŭ vi mem komprenos, ke mi ne povis resti retenema kaj fierega . . . Sed kial do vi ne rigardas . . . Jen, mi havas lipharojn . . . Mi estas dudeksesjara . . . Stranga vi estas. Ĉu vi koleras pri mi?”

Li ne respondis. Lia buŝo amare kurbiĝis.

”Eh! . . .” mi diris. ”Ĉi tiu grandioza silento! Bone, bone, mi jam memoras . . . Nu, kaj poste? Eterne oni ne povas fari tion. Nu jen, vi eble eĉ faros riproĉojn. Eh, mi petas vin, via granda silento ne estas tiel granda afero . . . Mi ne vidas, ke ĝi multe utilis al vi . . . Via vesto estas tre kompatinda, fileto. Kaj vi estas maldika. Pardonu, sed mi ne povus porti tian veston . . . Nu, kio! Ploru iomete, vi ricevos groŝon!”

Nun li rigardis min la unuan fojon. Severe, en miajn okulojn. Poste li denove forturnis sin.

”Vi multe parolas,” li diris seke.

Mi ofendiĝis.

”Ho, jen! Tre perfekta vi imagas vin. Jes ja, mi parolas, ĉar mi volas vin instrui . . . ĉu vi komprenas? Mi ja estas pli aĝa ol vi . . . kaj de tiam mi vidis multon . . . kaj spertis multon . . . vi estas infano . . . kion vi scias? . . .”

Subite eksingultis mia voĉo, mi mallevis la kapon, kaj tute mallaŭte kaj konfuzite mi ridetis, kaj mallaŭte kaj

konfuze mi levis la manon, kaj konfuze ridetante mi flustris:

” . . . Kion do mi faru? . . . tion oni ja ne povis, kiel vi imagis. Kredu, mi petas vin, ne estis eble . . . mi provis . . . sed vere ne estis eble . . . ”

Nun li turnis sin al mi. Kun kurbiĝinta buŝo, malame li alrigardis min.

”Kie estas la flugmaŝino?” li demandis raŭke.

Mi embarase balbutis:

”Do . . . kion fari . . . oni inventis ĝin . . . Farman . . . la fratoj Wright . . . mi ne estis tie . . . Sed kredu, ankaŭ ili faris ĝin sufiĉe bona . . . tute bona, laŭ la cirkonstancoj . . . oni povas per ĝi flugi . . . ”

”Mi vidas,” li diris moke. Poste li denove rigardis min.

”Kie estas la norda poluso?”

Mi mallevis la okulojn:

”Iu Peary ĝin atingis . . . Nu, mi petas, mi ne havis tempon . . . vi eraris . . . oni ne povas ĉion . . . tiam mi studis en la universitato . . . ”

”Jees,” li diris.

Poste.

”Kie estas la fera kaj libera Hungarlando?”

”Mi petas vin humile . . . vere stranga vi estas . . . ni laboras pri ĝi . . . ankaŭ mi . . . sed tio ne iras tiel rapide . . . oni devas ankaŭ vivi.”

Mi ekparolis rapidege:

”Sed vidu . . . mi tamen klopodis . . . ke io prosperu el tio . . . kion mi promesis al vi . . . Mi ja verkis . . . Tute bonajn aferojn . . . Rigardu ja, mi petas, la montrofenestrojn . . . mian nomon oni konas . . . bonnoma mi estas . . . kiel vi volis . . . kaj la homoj sufiĉe honoras min . . . Kaj vidu, ankaŭ librojn mi verkis . . . kiel vi projektis, rigardu ja . . . jen estas unu . . . tute bona . . .”

Nervoze mi tiris el mia poŝo unu el miaj libroj, en kiu estas ŝercaj skizoj kaj noveloj, kaj montris ĝin al li.

”Rigardu ja . . . tute bona . . .”

Unu nuran rigardon li ĵetis sur la libron, li ne etendis la manon al ĝi.

”Jes, mi jam vidis,” li diris mallonge. ”Tute bona.”

Li etendis sian brakon al la krepuskanta horizonto, al la kurbiĝantaj montoj.

”Kie estas la granda simfonio, la terura teatraĵo pri la griza horizonto kaj pri la fieregaj dioj, kiuj pulsas kaj baraktas malantaŭ la horizonto?”

Mi ruĝiĝis.

”Do, mi petas . . . tio ne estis ebla . . . Tion oni ne povas fari en tri aktoj . . . Vi eraris. La grizan horizonton ne povas ludi aktoro . . . poste mi rekonis, ke ĉi tiu ja ne estas la taŭga artospeco . . . kaj mi eĉ ne povus ĝin fini . . . Sed mi verkis pri tio beletan soneton . . . emi-

nenta revuo ĝin publikigis . . . kaj ĝi plaĉis . . . kaj de tiam oni pli bone pagas min.”

Li ne respondis. Li dronis en malhela silento, lia rigardo malaperis en la malproksimo. Mi volis ankoraŭ diri ion, klarigi, kiel juna li estas . . . sed malklare mi memoris, ke kiam li tiel rigardas, oni ne ĝenu lin. Subite mi rememoris pri mia edzino, kaj mi komencis maltrankviliĝi.

”Mi petas vin . . .” mi diris, ”venu kun mi, mi prezentos vin al mia edzino. Ho, vi ĝojos. Tre bela virino ŝi estas . . . valora, grandioza virino . . . vidu ja . . . kaj mi konkeris ŝin . . . ŝi amas min . . . vidu ja . . . mi tamen estas iu . . . kiel vi volis . . .”

Nun li rigardis min, kaj en liaj okuloj estis senfina moko.

”Vi konkeris ŝin,” li diris. ”Nu jen! Ho, kiel fiera vi estas pri tio! Vi iris al ŝi kaj konkeris ŝin! . . . La fortikaĵo descendis de la monto kaj per sieĝo okupis la valon! . . . La kverko konkeris la hederon kaj ame ĉirkaŭvolvis ĝin . . . Kial ne venas ĉi tien via edzino?”

Mi kuntiris la palpebrojn.

”Vi estas stulta,” mi diris. ”Infano vi estas. Ĉi tio estas fantaziaĵo. Vi ne estas prava. Mi estas prava. Mi estas plenaĝulo, kaj mi ekkonis la vivon. Kion vi scias pri la vivo! Vin ĉiu priridus!”

Li ekstaris tute apud mi, rigardis en miajn okulojn. Nun mi vidis lian densan, brunan hararon.

”Mi ne volis ekkoni la vivon . . . mi volis, ke la vivo ekkonu min . . . Vere, min ĉiu priridus, kaj vi ne volis, ke pro mi oni vin priridu . . . Sed vi scias, rigardu en miajn okulojn, kuraĝu rigardi en miajn okulojn! . . . vi scias, ke vi estas la ridinda kaj malgranda . . . kaj estas mi, kiu estas prava . . . kaj ke ne estas ridinda, kion mi diras . . . vi scias, ke mi estas prava . . . vi, kompatinda . . . vi, malgranda . . . vi, neniulo . . . Kuraĝu rigardi en miajn okulojn . . .”

Mi devis min forturni; la situacio estis stulta kaj turmenta. Li malrapide foriĝis de mi, poste li ne plu rigardis al mi, malrapide, enpenŝiginte li ekiris . . .

Nur post minutoj mi mallaŭte povis ekparoli:

”Kien vi iras? Restu . . . ,” mi flustris. Sed li ne plu turnis sin. Nur lian voĉon mi aŭdis ankoraŭ, de malproksime:

”Rememoru, ke foje ankoraŭ, laste, vi renkontis min . . . Kaj se vi enhavas ankoraŭ ion el mi, trempu vian plumon en la fajron de la subiranta suno kaj priskribu al ili . . . priskribu tiun ĉi renkonton . . . Kaj priskribu por ili, kiel mi forlasis vin kaj kiel mi malaperis, dissolviĝante en la krepuskanta ĉielo, juna, bela kaj senfine libera, por neniam vin plu vidi . . .”

Ĉi tion jam de tre malproksime mi aŭdis, kaj la svelta figuro maldikiĝis, disfluis, leviĝis. Mi ankoraŭ rigardis, mi kredis, ke mi lin vidas, sed poste mi rekonis, ke sur la ruĝa ĉielo svebas nur maldika nuboj.

Mia edzino malpacientiĝis.

”Kiu estis tiu junulo?” ŝi demandis.

”Mia malnova konato,” mi diris al ŝi konfuze. ”Afabla knabo . . .”

”Jes,” diris mia edzino iom akre. ”Nur malbonan konduton li havas. Kial li ne prezentas sin? Kvankam surprize li similis vin.”

Poste ni venis ĉi tien, en la kafejon. En mia prema humoro nur iom post iom disiĝis la spasma.

”La temo estas bela,” mi diris en mi, ekĝojinte. ”Por poemo ĝi estus iom longa. Sed novelon oni povas fari el ĝi. Mallonge, satire. Hodiaŭ krom tio estas mardo, decas ion liveri.”

Mi petis paperon, kaj post mallonga hezito mi skribis la titolon: ”Renkonto kun junulo . . .”

Kaj jam nur obtuze doloris la vundo.

Novelo pri la magneta morto

En la komenco de Februaro en la jaro 19 . . oni telegrame ordonis min al Melbourne, por ke mi, kiel gvidanto de la bakteriologia instituto de la universitato de Philadelphia, kolektu notojn kaj faru raporton pri la nova kaj terura epidemio, kiu aperis en tiu urbo kaj pri kiu ĝis nun nur peritaj kaj nekredeblaj famoj disfiltriĝis. La priskribo de la nova malsano, aŭ pli ĝuste: nova mortospeco — ĉar ne ekzistis eĉ unu resaniĝinta kazo — estis tute nekredebla.

Tute certe mi memoras, ke survoje plurfoje venis en mian memoron Edmund Dale, mia malnova lerneja kunulo, pri kiu mia plej nova informo estis, ke el la teologiejo, kiel konsekrita pastro, li translokigis sin al Melbourne. Tiel kuranta deziro trafulmis min, kiel bone estus, se ni renkontiĝus, mi almenaŭ ne estus tiel sola.

Pri tio mi en Melbourne, inter la ekscitoj de la unuaj tagoj, tute forgesis. El la hotelo mi fiakris rekte en la universitaton, al profesoro X, al kiu estis adresita mia rekomenda letero. De li mi eksciis poste la terurajn detalojn. La nova malsano aperis proksimume antaŭ unu kaj duona monatoj, tute neatendite. Ĉe la unua viktimo —

estis komercisto — oni ankoraŭ eĉ ne konjektis, pri kio temas: li falis sur la strato, cetere sana homo, oni ne sekis lin tro konsciencie, apopleksion oni konstatis. Nur ĉe la esploro de la kvara aŭ kvina subita morto malkovriĝis, ke ne estis apartaj individuaj kaŭzoj: oni trovis en la koro kaj en la cerbo tiun komunan, ĝis tiam nekonatan ŝanĝiĝon, al kiu similan la scienco — jen kio estas plej surpriza — ĝis nun konis nur el kadavroj mortigitaj de alt-tensia elektra fluo. Cetere la grimaco de la vizaĝo, kaj ankaŭ la spasma kuntiriĝo de la fingroj, montris tipe la saman bildon, — de profesoro X mi eksciis, ke la malsanon kaj epidemion populare oni jam nomas en la urbo "magneta morto" kaj "elektra morto". De kie ĝi devenas, pri tio neniu havis eĉ konjekton, tiom oni povis sendube konstati, ke ĉi okaze ne ĉeestas infekta materialo — bakterio —, ke nek la malsanulo, nek la kadavro estis danĝeraj al sana homo, eĉ ne pere, per la tielnomata bacilomastro, kaj mikroskopo povis malkovri en la histoj nur fizikajn ŝanĝiĝojn. En la plej diversaj partoj de la urbo neatendite malsaniĝis, falis, konvulsiis kaj mortis la viktimoj, ĝis nun pli ol tricent: el ili ducent dum la lastaj tagoj.

Mi ne estas verkisto kaj tial nur seke, raportmaniere mi rakontas, kion mi vidis kaj aŭdis: mi ne provas doni imagon pri tio, kiel kreskis mallaŭte, kun glacimalvarma premo ĉi tiu teruro, kiun iu, konanta la kaŭzon de ĉi tiu

paniko, povis rimarki sur la vizaĝoj kaj en la maltrankvilaj rigardoj de la homoj, surstrate, surplace, en la tuta moviĝema urbo: ĉar cetere la urbo vivis sian vivon. Mal-longe tiom, ke jam en la unua semajno mi havis okazon vidi kadavron de homo mortinta pro magnetata morto kaj, dolore, ankaŭ la magnetan morton mem.

Mi rapidis ĝuste en mian loĝejon, por kunpreni kelkajn preparatojn — mi devas konfesi, en tiu tempo sekrete mi ankoraŭ klopodis montri, ke la kaŭzo de la magnetata morto tamen estas infekta materialo, bakterio, kiel tiu de aliaj epidemioj —, la opinion de la ĉi-tieaj kuracistaj rondoj mi, kiel tiuspeca laboratoria homo, kun iom da interna malica ĝojo kaj sciencula fierego, kredis nava fantaziaĵo, malinda al vera scienculo, kaj jam estis pretaj kelkaj paĝoj de mia disertacio dediĉita al la *Bacteriological Weekly*, pro kiu iom longiĝos la nazo de ĉi tiuj sinjoroj.

Ĉe haltejo, eĉ en la elektra vagono, kiun mi estis descendinta, ĝi okazis. Mi faris kelkajn paŝojn, kiam ek-timintaj, sufokitaj krioj, post mia dorso, min haltigis. Homo kuŝis senpere antaŭ la ŝtupo de la elektra vagono, ŝajnas, ke ĵus li descendis, kiam la atako lin trafis. Epilepsiaj konvulsioj skuis ĉi tiun homon, lia dika burĝvizaĝo taŭziĝis en teruraj turmentoj. Tuj estiĝis tumulto, kelkaj kliniĝis super lin, certe jam en la unua momento mi aŭdis la vortojn "magnetata morto".

Mi turnis min kaj rapidis tien, kaj mi rekte alkuris Edmondon Dale, kiu rapidante, preskaŭ kurante, proksimiĝis al la trotuaro.

Mi rekonis lin.

”Dale!” mi alkriis lin.

Li ektimis kaj min rigardis. Lia vizaĝo estis tre pala kaj krome, ĉar tion ja povis kaŭzi la ĵusa sceno, ĝi estis surprize maldika kaj turmentita.

”Mi jam volis vin viziti,” mi parolis rapide, ”mi pensis, ke mi vizitos vin. Se vi volas, ni tagmanĝu kune. Kio okazis ĉi tie?”

Li nervoze ŝultrolevis, ankoraŭ ne respondis, sed kiam mi volis paŝi al la amaso, li kaptis mian brakon.

”Eh, lasu,” li diris kolere kaj raŭke, ”kion vi vidus je li?”

Mi volis klarigi, ke, kiel kuraciston, min interesas la afero, sed li spasme tenis mian brakon kaj trenis min al la trotuaro. Kaj dume rapide, sufoke li diris:

”Iu stulta filistro, kiel mi sciu. Antaŭ min li ŝovis sin, ĝuste kiam mi volis descendi. lomete li eble eĉ ekpuŝis min. Nun tie li kuŝas.”

”Ĉu ankaŭ vi veturis do en ĉi tiu elektra vagono?”

”Jes. Pardonu, mi ne rimarkis vin.”

”Kaj ankaŭ mi ne vin.”

Kelkajn minutojn ni iris senvorte unu apud la alia. Mi ne scias, kial mi konfuziĝis: stranga, malvarma sento min kaptis.

”Tamen mi estus devinta lin rigardi,” mi diris fine. ”Ŝajnas, ke ĉi tiu epidemio . . . kiun ĉi tie oni nomas magneta morto . . . jes, ĝuste pro ĝi mi estas ĉi tie en Melbourne.”

Li haltis, turnis sin al mi kaj profunde rigardis en miajn okulojn. Mi jam malfermis la buŝon, sed ne venis voĉo tra mia gorĝo. Fremda teruro min kaptis, kaj sur la fino de miaj fingroj mi sentis iun tiklantan pikpikon: ankaŭ miajn harojn kvazaŭ frapis io, kvankam lia rigardo estis profunda kaj malĝoja, kaj dolora kaj intima.

”Vi ne rigardos tion, ĉu ne,” li diris milde, malgaje ridetante kaj konstante rigardis min, ”vi ne rigardos tion, ĉar mi petas vin, kaj ĉar vi ne volas obstini kontraŭ mi.”

Mi ne povis respondi, tima miro tremis en ĉiuj miaj nervoj.

Kun pendanta kapo li iris kelkan tempon, poste lace, monotone li komencis paroli, kvazaŭ li parolus antaŭ sin.

”Nun jam estas ja egale . . . hodiaŭ, aŭ morgaŭ . . . mi ja ne restos ĉi tie . . . kaj se mi ne estus vin renkontinta . . . mi rakontus eble al alia homo . . . al fremdulo . . .”

Li haltis.

”Mario,” li diris tremante, ”ĉiam mi ŝatis vin . . . mi almenaŭ tiel scias, tiel pensas . . . Sed tamen mi petas vin, iru de ĉi tie, forkuru rapide el ĉi tiu urbo . . .”

”Ankaŭ mi ŝatis vin ĉiam,” nur tiom mi povis diri. Kurioza konversacio estis ĉi tio sur la strato. Li denove rigardis al mi.

”Ĉu vi estas certa pri tio?”

Mia buŝo konvulsie balbutis ion. En mia cerbo eksidis nebulo. Sveno min ĉirkaŭis, mi ne sciis, ĉu de horoj ni staras ĉi tie rigidiĝinte, aŭ ĉu pasis nur minutoj. Kun terura fortostreĉo, kiel iu parolanta en dormo, mi elĝemis kun kompatinda teruro:

”Ne . . . ne . . . ne diru . . .”

Sed jam estis malfrue.

”Mi estas la magneta morto,” diris Edmund Dale.

*

”Mario, ĉiam mi kredis pri mi, ke mi amas la homojn, mi kredis je mi kaj je mia boneco, kiam mi fariĝis pastro kaj venis en Aŭstralion. Kiam tiu abomena afero, tie sur la insulo, okazis, — kiam kelkajn tagojn poste mi komprenis, ke tio estas vere tiel, ke tio nun jam estas por mi tia kapablo, kiel por kameleono ŝanĝi koloron, aŭ por elektra rajo mortbati etajn fiŝojn: tiam mi dankis Dion, ke min li malbenis per ĉi tiu potenco kaj ne iun alian, kiu misuzus ĝin. Ĉu mi scias, kiu mi estas kaj kio ni estas

ĉiuj, kiuj kredas nin bonaj kaj amantaj, ĉar ni abomenas sangon kaj ne ŝatas vidi doloron. Tie sur la insulo, kiam la morta timo vekis en mi unuafoje mian teruran kapablon, kiam mia atakinto kaj murdonto ve-ĝemante falis kaj sterniĝis, sen ke mi estus lin tuŝinta — tie mi ankoraŭ povis min mistifiki, ke tio, kio okazis, okazis el sindefendo, kaj malica intenco ne pariĝas en mia koro kun la terura forto de mia cerbo. Sed kiam komercisto, kiu preteriris min sur la strato, falis kaj mortis post cent paŝoj — kaj kiam kun streĉiĝintaj haroj mi rekonis la samajn konvulsion kaj spasmon sur lia taŭziĝinta vizaĝo: tiam mi esploris min, kaj mia korbato haltis — mi rememoris, ke, kiam li preteriris min, mi ekenviis lin pro lia bela surtuto, kaj mi estus volinta tian ankaŭ por mi. Mia volo, pri kiu mi kredis, ke ĝin direktas prudento kaj pripenso, en la mallumaj profundoj de mia cerbo, pri kiuj mi ne konscias, en kiuj kaŝite kaj libere kaj senbride laboras nia denaska, neniam ŝanĝiĝanta instinkto — mia senkonscia volo kondamnis je morto la malfeliĉulon, ĉar li havis pli belan surtuton, ol mi havas — kaj mia malbenita kapablo plenumis la kondamnon. Ne interrompu, ne ekskuzu, ne parolu — aŭ ĉu vi ne songas ofte la morton de viaj konatoj, parencoj, patrino kaj gefratoj? Ŝvitante vi vekiĝas kaj bedaŭras ilin, kaj vi kredas, ke vi ĝojas, ke tio estis nur songo — kvankam en via songo laboris en vi la liberiĝinta volo, en via songo vi deziris

ilian morton, vi mortigis ilin: — kaj se vi memore trapasas la tagon, kiu antaŭis ĉi tiun sonĝon, vi rimarkos, ke tiutage per io ofendis vin tiu, kiun vi mortigis — li kurbe alrigardis, krude alparolis vin, aŭ vi aŭdis pri li, ke li pli enspezas ol vi. Ho, el terura sperto mi scias, ke pro plej eta ofendo ni deziras morton al ĉiu — morton, kelkfoje eĉ sen ofendiĝo, ĉar rabobesto loĝas en ni, kiu mortigas pli, ol ĝi povas konsumi. Atentu bone, Mario. Ĝis nun mi murdis tricent homojn, pri kiuj, se ne intervenus ĉi tiu terura malkovro, neniam mi estus eksciinta, ke mi deziris ilian morton. Grandparte ili estas indiferentaj, nekonataj stratirantoj — momenton mi renkontis ilin, eble ilia vizaĝo ne plaĉis al mi, aŭ ne afable ili alrigardis min. Sed estis inter ili multaj bonaj amikoj kaj multaj, pri kiuj mi kredis, ke mi amas ilin kiel min mem. Ĉu vi rememoras la hodiaŭan homon, kiu mortis apud la elektra vagono? Mian duonminuton li volis forrabi, antaŭ mi li descendis. Mi mortigis lin, ĉar dum momento li baris mian vojon.”

Mi kapturte ĉirkaŭrigardis. Eterne restos enigmo antaŭ mi, kiel ni venis ĉi tien en lian ĉambron. Edmund Dale staris apud ŝranko, kun dorse metitaj manoj, rigardante antaŭ sin.

”Kaj mi mortigis la knabinon, kiun mi amis kaj por kiu mi estus povinta morti, ĉar ŝi postrigardis anglan ofici-ron sur la strato.”

Malrapide mi mallevis min sur la teron: miaj manoj serĉis en mia poŝo, senkonscie. Kvazaŭ en sonĝo mi elmetis ĉion, kio estis ĉe mi.

”Edmund Dale . . .” mi balbutis kun frosta ŝvito sur la frunto, ”prenu . . . jen estas ĉio mia . . . ĉu vi volas mian horloĝon, mian monon . . . ?”

Li kurbigis la buŝon, ŝultrolevis. Distrite li ekserĉis inter la aĵoj, kelkaj paperoj trafis lian manon, li rigardis ilin.

”Ha,” li diris kaj flankenĵetis ilin, ”malgranda disertaĉio . . . kontraŭ niaj kuracistoj . . . kiu, se ĝi aperos, iom rompos ilian reputacion . . . eventuale bankrotigos ilin . . . Kompreneble, se malkaŝe vi kuraĝus mortpiki viajn kolegojn, estus pli bone . . . sed la leĝoj . . .”

Malbele li ridis:

”Mi ne tuŝos vin, sed nur tial, ĉar mi malŝatas vin kaj ne volas havi aferon kun vi. Ankaŭ vi estas tiel mizera, kiel mi. En la mezepoko oni pli malmulte mortigis unu la alian, ĉar nobla kavaliro povis mortigi en publika batalo aŭdaculon, kiu preterirante tuŝis lian talaron. Hodiaŭ multaj leĝoj kunprenas en ni la sovaĝbeston — pli granda estas la forto, kaj ĝi trovas por ŝi pli multajn flankvojojn.”

Dum minutoj li iris kun dorsen metitaj manoj kaj pendanta kapo. Poste mi rememoris, ke dum ĉi tiu tempo, kaŭrante sur la tero, kun tiaj moviĝoj mi atentis lin, kun

entirita kapo kaj kurbigita kolo, kiel katviro ĵetita en kaĝon de lupoj. Li haltis antaŭ mi.

”Ne timu, Mario, foriru en paco. Kaj vi povas skribi, ke la magneta morto ĉesis en Melbourne — vi povas skribi tion kaj mortigi viajn kolegojn per kelkaj pikaj vortoj, laŭ via maniero. Mi ne havas ion por serĉi inter vi. Dank’al Dio, mi rekonis, ke kontraŭ besto mi ne havas potencon, nur kontraŭ homo. La homa gento pereos sur la tero, ĉar ĝia instinkto jam putris kaj degeneris en ĝia malsana animo — ĝi manĝos sin mem, en sia terura avido kaj malamo. Filo de la plej naŭza raso de la tero, mi, en kiu enkonsciigis ĝia kulpo — kun naŭzo mi forĵetas la nomon kaj tradicion de mia malpura familio por reiri inter la purajn kaj noblajn bestojn, kiuj diskarnas unu la alian en malkaŝa batalo kaj inter kiuj la mortiganto riskas almenaŭ sian propran haŭton, por ke plenumiĝu ĝia fato, kiu vokis lin por kulpi kaj morti kaj pereji, vivi inter mildaj floroj kaj mutaj arboj kaj surdaj akvoj . . .”

*

Post du semajnoj mi reiris en Amerikon kun la raporto, ke la mistera malsano tiel, kiel ĝi venis, senpostsigne malaperis. Mia disertacio aperis kaj faris sensacion. Pri Edmund Dale de tiam mi ne pensis kaj al neniu parolis; se min trafis pri li memoro, mi ĝin forpelis kvazaŭ stul-

tan delirsonĝon. Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis pri li sciiĝon, ke oni trovis lin disŝirita en arbaro: iu malofta sovaĝbesto, videbla nur en zoologiaj ĝardenoj, kuŝis apud li; ŝajnas, ke dum luktado ili pereis ambaŭ — la kapo de la pastro inter la teruraj makzeloj de la besto, liaj kunpremitaj fingroj sur la kolo de la besto, — oni apenaŭ povis ilin disigi.

Genius

Estis vespero, — Varmo-Malkresko, kiel en Talp-Ulio oni nomas tion, kaj oni tiris malsupren la ventoĵaluziojn de la kafejo. En la salono luksa, establita per divers-palpaj tabloj, eksonis la elektraj signal-harpoj, kaj en alternantaj G- kaj D-duroj ili muĝis senĉese, allogante la gastojn.

Ĉe la meza, tielnomata "malglata tablo" sidis la kutimaj gastoj de la kafejo; muzikistoj, verkistoj, scienculoj: honoratoj de la eminenta mondo. La konversacio fluis malvigle, plej multaj el ili eĉ ne parolis; enue ili palpis la fingrotiklajn arabeskojn de la seĝapogiloj. Ĵus alvenis Dand, la verkisto: — basvoĉa, porohaŭta, bonodora junulo. Ĝentile li palpis la vizaĝojn de la ĉeestantoj, flaris siajn fingrojn, poste neglekte sidiĝis.

"He, kelnero," ekparolis Sinfon, la laŭmoda komponisto, en sia karakteriza B-molo, "alportu glason da duonfluida kaj mez-odora papavaĵo, sed ĝi estu bone glata!" Poste li turnis sin al Dand kaj palpis lian vizaĝon. "Ĉu vi tion legis?" li demandis kun iom da milda moko en sia voĉo.

”Kion vi bonvolas aludi?” demandis Dand lin flarante.

”La artikolon de tiu duonfreneza Genius, en la hodiaŭa ’Nacia Palpo’. He, kelnero, alportu la ’Nacian Palpon’.”

La malalta, glatvizaĝa knabo rapidante flaris al la tablo kaj metis sur ĝin la mallarĝajn, bonodorajn tabulojn de la ’Nacia Palpo’. La fingroj de Dand iom enue trakuris la unuajn liniojn, poste li repuŝis ĝin sur la mezon de la tablo.

”Mi legis ĝin,” li diris indifere, ”pri Genius mi jam de longe havas mian opinion. Originalema strangulo, kiu krome tre volus veni ĉi tien, al nia tablo. Li streĉas ĉiun sian forton por inventi ion novan, por kapefrapi la prudentan homon. Blufulo.”

”Do vi tiel perceptas lin,” iu diris enpenŝiginte.

”Nepre. Pri tiuspecaj fenomenoj oni ne sin okupu serioze.”

”Do pri kio li skribas propre?” demandis tute juna, maldika voĉo, facile elflarante la societon.

”Tion ankaŭ mi dezirus scii,” daŭrigis Dand. ”La kapo ekdoloras pro tio. Sincere dirante, mi kredas, ke li frenezigiĝis.”

Kiuj legis la artikolon, ĉiuj nun jam emis deklari, ke Genius certe frenezigiĝis. Ne estis pli interesa temo, iu anoncis sin, ke li rakontos la enhavon de la artikolo.

”Do, tuj ĝia komenco estas tre stranga. Genius deklaras per naive solena voĉo, ke li volas paroli pri admirindaj aferoj, ke en sia filozofio li faris mirigan paŝon, pri kiu li volas verki eĉ libron, se ĉi tiu artikolo faros la necesan efikon. Per kuriozaj vortoj li parolas pri ĉi tiu malkovro.”

”Malkovro? Do kio ĝi estas?”

”Hm, se tion oni povus nur elventri! Do unue li komencas per iu konfuza fiziologia studo. Li parolas pri subjektiveco de sensoj, pri ekkonoj absoluta kaj relativa. Li diras, ke de kelka tempo li havas kuriozajn sentojn. Li rekonis, ke por ekkoni kaj senti la aferojn, ni disponas pri multe tro malvastaj, subjektivaj iloj. Li diras, ke la ekzisto devas havi neklarigeblajn, gigant-signifajn ecojn, pri kiuj ĝis nun ni eĉ ne konjektis.”

”Ne diru!”

”Stultaĵo! Malnova ludo.”

”Abstrakta spekulado!” diris malŝate universitata profesoro. ”La knabo ensuĉis multan abstraktaĵon.”

”Atendu! Poste Genius transiras en pli kuriozaj, rap-sodaj frazoj al tio, ke en lia sensado ekestis tiel admirinda, nekomprenebla ŝanĝiĝo, pri kiu li certe scias, ke neniam en Talp-Ulio oni sentis ion similan. Li diras, ke novajn, nekonatajn fenomenojn de la naturo li eksentis.”

”Nu, nu, nu! Kion ankoraŭ?”

”Atentu, liajn proprajn vortojn mi citos: ’Komence ankaŭ mi pridubis ĝin, sed nun mi jam estas certa, kaj ĉi tiu certeco vekas tiel transteran, superhoman jubilon en mia koro, al kiu kompareblan Talp-Ulia homo ankoraŭ neniam sentis antaŭ mi. Fizike ĝi komenciĝis, jes, fizike. De kelka tempo en la supra parto de mia vizaĝo, en la du supernazaj, plataj ŝvelaĵoj, kies destinon niaj scienculoj eĉ nun ne konas tute, — nu do, en tiuj ĉi du ŝvelaĵoj mi sentis strangan pikon kaj konstantan inciton. Antaŭ mateno mi turnis min en la direkton de Varm-Oriento, tiel forta estis ĉi tiu incito, ke ĝi doloris al mi. Kaj mi rekonis, ke tiun ĉi inciton faras la objektoj mem, ankaŭ tiuj, kiujn mi nek flaris, nek palpis. Mi ne scias, kiel mi klarigu ĉi tion al vi, Talp-Ulianoj: mi timas, ke vi tute ne komprenos min’.”

”Hu, kiel solena li estas,” iu interrompis.

”Li parolas kvazaŭ antaŭurba paroĥestro,” menciis iu alia. ”Vane, neniam li havis stilon!”

La fingroj de la voĉleganto trakuris la gazet tabulon.

”Atentu,” li diris denove, ”poste jene daŭrigas paĉjo Genius:

’La aferoj do, kiel nun mi jam estas certa pri tio, havas krom siaj amplekso, sono, odoro, ankoraŭ alian, grandiozan econ, kiun esprimi per vortoj mi ne kapablas. Tiu ĉi eco estas pli ĝenerala, pli signifa ol tiuj aliaj. Mi ne povas trovi vortojn por la sentoj tumultantaj en

mia animo: mi dezirus, ke per mia animo mi povu rakonti al vi, kian raviĝon mi sentas, ke mi ekposedis ĉi tiun novan absolutan Veron, kiu min surprizas kaj ellevas el mia propra memo. Nova mondo malfermiĝis antaŭ mi, — ĉi tiu mondo ne havas limojn kaj barojn: ĝi estas pli alta imperio de la spirito. Centmiloj da impresoj svarmas kaj tumultas en mia ebria cerbo: mia imago pale refalis en la malplenon, tra kies malvasta faŭko mi elleviĝis en la liberon. Komprenu min: pri ĉio mi scias, ankaŭ pri tio, kion ne atingas miaj sensoj. Supren mi turnas la vizaĝon — kaj senlimaj, mole ondantaj imagoj kovras mian cerbon, ĉar iun senfinan, molan platon mi sentas, en senfina malproksimo. Malsupren mi turnas la kapon: kaj centspecaj impresoj min surprizas, sen ke mi etendus la manon. Mi proksimiĝas al vi: kaj subite fremda frostotremo trakuras mian korpon —: mi vin ek-sentis ne sensinte. Iuj longaj, etendiĝemaj, flirtantaj aĵoj vi estas; vi kunvolviĝas kaj apartiĝas: mi timas vin. Ebria narkoto min kaptas. Mia cerbo ne plu eltenas la kolosan ĥaoson de konceptoj kaj impresoj — mi volus krei kaj etendadi la manon. En pli altan, pli vastan sferon de la Ekzisto, ŝajnas, ke mi venis: pli proksimen al la rezidejo de la senfina Ideo. Nova vivdestino malfermas sin por mi — niaj vojoj ĉi tie disiras. Talp-Uliaj fratoj — mi bedaŭras kaj kompatas vin. Novan, neniam aŭditan, ankoraŭ ne kreitan, nekonatan vorton serĉas mia menso,

per kiu mi esprimu mian kompaton kaj feliĉon, adiaŭe, antaŭ ol anime mi forirus de vi. Mi elkuros en la liberon — — dispuŝas la brakojn: — kaj jubile, ekkrie eksplodas el mia koro nekonata krio de nekonata lingvo: Lumo! . . . Lumo! . . . Lumo,!. . .”

La voĉleganto eksilentis kaj metis la tabulojn de la ”Nacia Palpo” sur la mezon de la ”malglata tablo”.

Subite estiĝis silento; eĉ ne unu voĉon oni povis aŭdi ĉirkaŭ la ”malglata tablo”; nur la signal-harpoj muĝis, kun surda, susuranta muĝo, ki el tiuj rondaj konkoj, kiuj kroĉiĝas sur la bordo de la sal-odora maro al la ŝuoj de la Talp-Ulianoj.

”Lumo . . .” iu ekparolis poste acide kaj sen kuraĝo, kvazaŭ malfrua, malbonhumora eĥo.

Je ĉi tiu vorto ĉiu revekiĝis el tiu stranga, fremda sento, kiun faris la efiko de la kurioza artikoleto. Ili ekmoviĝis. Sinfon faris rapidan kaj koleran mangeston: la universitata profesoro malagrable ekridis.

”Dekadenco,” diris estetikisto. ”Niaj pli novaj verkistoj estas dekadencaj.”

La verkisto ekkoleris.

”Ĉu dekadenco? Eh, lasu! Blufulo! Trovolulo! Ĉio ĉi estas nur fortostreĉo . . . ĉi tien li volas veni . . . inter nin . . .”

La lastajn vortojn li jam diris kvazaŭ stertore. Peza paŭzo estis.

”Sed do fizike . . .” komencis poste ĵurnalisto.

”Eh, fantaziaĵo . . .”

”Metafiziko,” finis la diskuton la universitata profesoro. ”La metafiziko estas senvalora, malplena cerbo-rezonado: pli aĉa eĉ ol la okultaj sciencoj. Ĝi faras nur sencecon kaj konfuzon en la metodo. Metafiziko.”

Ĉi tie li metis tre grandan punkton, kvazaŭ signante, ke li rigardas la kazon fintraktita.

Post ĉi tio oni ja ne povis multe rezoni.

”Metafiziko,” kapjesis do finante ankaŭ la estetikisto.

”Metafiziko,” ĵetis post li kompateme la ĵurnalisto.

”Metafiziko”, ĝemis malpeziĝinte la kritikisto, li ĝojis, ke tiel simple oni povas solvi ĉi tiun problemon.

”Kompreneble metafiziko,” flustris laste la muzikisto, al kiu plaĉis la vorto.

Poste amplene ili flaris kaj palpis unu la alian. Pli da vortoj ne sonis. Nur la verkisto pensis pri Genius kaj konstatis, ke rezulte li estas nedisciplinita frenezulo. La muzikisto meditis pri sia morgaŭa prezentado. La ĵurnalisto pensis pri tio, ke ĉion ĉi oni povus fruktuzi. La ceteraj klopodis pensi pri tio, pri kio pensis la universitata profesoro, kaj tial ili malŝate ridetis. La universitata profesoro estis tre kontenta pri si kaj pensis pri nenio.

En apogseĝo, ĉe la fino de la tablo, mute kaj senmove sidis inter ili Genius kaj kun man-apogita tempio, kun revema rideto sur la duonfermitaj lipoj, *rigardis* la Talp-

Ulianojn, kiel ilia plata kaj glata frunto malplene direktiĝas al la fajro de la lucerno brulanta sur la mezo de la tablo.

Cezaro kaj Abu Kair

I.

Tiutempe iu migranta fakiro inventis senmortan ŝakludon, kaj la miriga metio febrigis la tutan Hinduĵon. De la reganto malsupren ĝis la lepra almozulo kuŝanta sur la vojflanko, ĉiu ŝakis, la regula batalo de la tridek du figuroj kaj la milspecaj ebloj de ĉi tiu batalo instigis kaj incitis la cerbojn. Dum kelkaj jaroj la ŝakscienculoj kaj ŝakkompetentuloj elanalizis dek diversajn malfermojn, kaj jam ekzistis majstroj, kiuj gvidis dek ludojn en unu fojo kaj ludis ankaŭ sen tabulo, dirante la paŝojn.

Sed multe pli ol ĉiuj sciis, kaj ĉiujn venkis Abu Kair, la mondmajstro, kiu destinis sian tutan vivon al solvado de la misteroj de la ŝakludo. En sia kvara jaro li jam konis la fundamentajn regulojn, kaj en sia deka jaro li venkis la grizbarban Hasanon, kiu ĝis tiam havis la famon de plej bona ŝakludanto. Sed Abu Kair sidis la tutan tagon apud la ŝaktabulo, analizis la variantojn kaj preparis sin je ĉiuj eblaj kontraŭpaŝoj. En sia dudekkvina jaro li estis nevenkebla majstro, li ne konis virinon, kartludon, ĝuon, ĉio estis por li la ŝako. Kun pala vizaĝo kaj kun brutaj

okuloj li sidis antaŭ la tabulo: la ŝakliteraturo ŝuldas al li kvar faklibrojn kaj naŭcent tridek ŝakenigmojn.

Li mortis en sia tridek-sesa jaro, en cirkonstancoj mirigaj kaj afliktaj, sed karakterizaj por lia vivo. Ĝuste grandegan mondkonkurson oni aranĝis en Bagdad, kaj Abu Kair ŝakis tage-nokte, dum kvar tagoj, samtempe gvidante kvindek ludojn. Ĉe la vesperkrepusko de la kvara tago li stariĝis, metis glacian kompreson sur la frunton kaj iris el la ĉambro por spiri aeron.

Estis milda julia vespero, kaj Abu Kair proksimiĝis al la rivero. La vento levis la foliarojn de la arboj, sed Abu Kair ne sentis la venton. En stranga febro brulis liaj okuloj, la palpebrojn li duone fermis, rapide, kun oftaj palpebrumoj li ĉirkaŭrigardis, kaj du fingroj de lia dekstra mano tremante, singarde etendiĝis antaŭen en la aeron. Liaj lipoj murmuris ion.

Malsupre, sur la bordo de la rivero, sidis paŝtistknabo; ne tre malproksime de li kuŝis bela knabino, surventre, plektante girlandon el herboj. La knabo ofte okulumis malantaŭen, foje li stariĝis kaj malrapide ekiris al la knabino. En liaj okuloj brilis petola lumo, kaj li jam malfermis la buŝon por paroli. Tiam seka mano kaptis lian kolon kaj retiris lin. Li ektiminte rigardis supren, kaj lia rigardo stumblis je la febraj okuloj de Abu Kair.

”Reen,” flustris Abu Kair kolere, ”ĉu vi freneziĝis? La peono ne povas paŝi returne!”

La knabo balbutis ion.

”Restu tie, kie vi sidis,” flustris plu Abu Kair, ”ĉi tie vi estas sur la plej bona loko. Antaŭ vi la kuranta rivero, ĝi vin ne povas preni, ĉar nur rekte ĝi povas preni, en unu direkto. Post via dorso estas la damo, ankaŭ ĝi ne povas vin preni; sed se ĝi venos ĉi tien sur la bordon, en la lastan linion, vi povas doni al ĝi ŝakon, kondiĉe ke mi vin defendos. Restu nur sur via loko, mi faros el vi damon.”

La knabo surprizite silentis, ĉar li kredis, ke lin kaptis sorĉisto. Li ne konis la ŝakregulojn kaj ne sciis, ke laŭ ili el peono kondukita sur la lastan linion de la tabulo fariĝos damo.

Abu Kair staris apud li kun brulantaj okuloj kaj tremantaj manoj kaj sovaĝe ĉirkaŭrigardis.

”Aha,” li diris kaj raŭke ridis. ”Rigardu tien, al la transa bordo, ĉu vi vidas?”

La knabo ankoraŭ nenion vidis.

”Ĉar vi estas komencanto,” diris Abu Kair bonvole. ”Sed min ili ne erarigas. Tie transe, tie apud la arbitaĵo, ili kredas, ke mi ne vidas tion, tie staras figuro . . .”

Tiam plie rigardis lin la knabo, kaj terurita krio ŝiriĝis el lia gorĝo. Sur la transa bordo, post arbitaĵo, grandega tigro embuskis, preta al salto, kun aldirektitaj okuloj. La knabino jam estis forkurinta; terurita de Abu Kair, nun ankaŭ la knabo volis forkuri.

”Vi restos, vi restos,” flustris Abu Kair kaj tenis lian kolon, ”kion vi timas? Vere, ke la figuro estas ĉevalo, aŭ tigo, egale . . . Vere, ke ĝi povus vin preni de la tabulo, ĉar ĝi povas fari du paŝojn flanken, unu antaŭen, sed vi povas esti trankvila, ĝi ne prenos vin, ĝi ja vidas, ke mi, la reĝo, vin defendas. Se ĝi prenas vin, mi prenos ĝin. Li ja ne donos ĉevalon por peono? La plej malbona kombino . . . tion li ne faros kontraŭ mi, forta ludanto. Kaj se tamen . . . maksimume mi oferos vin, tiam mi ja certe gajnos la ludon. La ludo estas grava, ne la figuro.”

Sed al la knabo jam sufiĉis, li humile dankis, sed li ne deziris, ke por la intereso de la granda ludo oni lin oferu. Li forte piedbatis la kruron de Abu Kair, ŝiris la kolon el lia mano, kaj tiel li forkuris turdirekten, kvazaŭ leporo.

”Malbenita azeno,” kriis post lin Abu Kair, ”kion do vi timas? Vi ja kuras ĝuste en malbona direkto, la turo vin nepreprenos, sen iu utilo. Atentu, la turo kuras pli malproksimen ol vi.”

Sed la knabo ne timis la turon. Kaj Abu Kairon en la sekvanta minuto atakis la tigo.

”Haha,” diris moke Abu Kair, kiam de du paŝoj li vidis brili la brulajn okulojn, ”naiva paŝo. Ŝako! Al mi ŝako! Infana paŝo! Malforta ludo!”

Li gestis per la mano, kaj trankvile pripensinte faris unu paŝon dekstren.

”Nu, nun kion vi faros?” li diris moke kaj triumfe al la tigro, kunfrotante la manojn. ”Nun, kie vi donos alian ŝakon? Ne estas eble, prenos vin la turo. Komprenoble, vi ne rimarkis la turon post via dorso. Jen, amiko, oni devas scii ludi. Nun vi povas rezigni la ludon. Vi perdis.”

Kaj la tigro eksaltis, prenis Abu Kairon kaj tramordis lian gorgon.

II.

Cezaro vivis gajan kaj senzorgan vivon ĝis sia deka jaro, en la festenoj de eminentaj patricioj li pli ofte estis videbla ol en la kolegio. La greka filozofio ne tre interesis lin, sed des pli la virinoj kaj la kartludo. Sed bone li skermis, kaj laŭfame li estis bonega konversaci-anto.

En tiuj rondoj, kie li povis veni, en kalkulon kiel venonta politikisto, oni ne konsideris lin serioze. Tio estas certa, ke tiu eminenta familio, el kiu li devenis, kaj la bonegaj rilatoj de lia familio, lin destinis por politika kariero, sed Cezaron neniam oni vidis sur la forumo, kun vakstabulo en la mano, por noti la parolojn de grandaj oratoroj, el kiuj la eternvalorajn normojn de la retoriko povas alproprigi ĉiu entuziasma kaj ambicia junulo. Anstataŭ ĉi tio li sciis tiajn intimajn kaj karakterizajn

aferojn pri la opaj homoj, pri ilia privata vivo, kiajn ventumi sur la forumo ne estas kutime. Pri ĉiu oratoro li sciis, kiu estas lia amatino, kaj se estiĝis parolo pri iu, moka kaj neatendita rimarkigo de Cezaro, per kiu li ĵetis surprizigan lumon sur la respektivan personon, subite silentigis ĉiujn. Oni timis lin kaj koleris pri li.

En sia dekoka jaro, ricevinte beletan monsumon, li faris pli longan plezur-vojaĝon en Hindujon. Returne li enŝipiĝis, por reiri tra Greklando en sian patrujon. Ĉi tiun fojon piratoj kaptis la ŝipon, la ŝipanaron ili ĵetis en la maron, kaj Cezaron kiel kaptiton ili portis sur la ferdekon de la piratŝipo, antaŭ kapitanon Ben Jussuf.

La kapitano, kiu akiris eminentan edukon en Bagdad, vidante, kun kiu li havas aferon, akceptis Cezaron kun konduto konvena al la socia pozicio de Cezaro. Li ja klarigis al li, ke li rigardas lin kaptito, kiun, laŭ bontrovo, li povas eĉ murdigi, sed li estimis en li la ĝentilhomon kaj certigis al li liberan iradon sur la ferdeko.

Ben Jussuf sekrete ĝojis, ke inteligenta homo venis sur lian ŝipon. Li estis pasia ŝakludanto kaj kalkulis je tio, ke li trovis indan kontraŭludanton. Iun vesperon li komencis paroli pri la ŝakludo, kun granda ekstazo li klarigis, kiel senmortajn meritojn akiris Hindujo per la eltrovo kaj kulto de ĉi tiu ludo. Sed Cezaro, kiu apenaŭ konis la ŝakludon, aŭ maksimume nur supraĵe, akompanante kelkajn ludojn hazarde, ridetis moke kaj fierege. Je la

demando de Ben Jussuf, kial li faras tion, li deklaris, ke li opinias la tutan ludon stultaĵo kaj stultaj ĉiujn, kiu ludas ĝin. Cetere, kvankam ĝis nun li apenaŭ ludis ŝakon, li ne kredas, ke estus iu en Hindujo aŭ kie ajn, kiu lin venkus aŭ povus eldevigi de li remison.

Terure ekkolerinte pro tiu impertinenta kaj fanfarona parolo, Ben Jussuf jam preskaŭ volis insulti Cezaron, sed poste li moderigis sin, kaj ŝajne trankvile li alvokis Cezaron por unu ludo de ŝako, kun la kondiĉo ke, se Cezaro gajnos la ludon, li redonos al li la liberecon; sed se li perdos ĝin, li pendigos lin sur la plej supran kruclignon de la plej granda masto. Cezaro kapbalance akceptis la kondiĉojn kun facila kaj neglekta rideto kaj sidiĝis apud la ŝaktabulo, signante, ke li estas preta tuj komenci la batalon.

Ben Jussuf, kiu metis sian glavon apud si sur la tablon, vidis jam ĉe la unuaj paŝoj, kion li ja tuj konjektis, ke li havas aferon kun tute sensperta kaj komencanta ludanto, kiu multfoje konfuzas eĉ la plej elementajn kondiĉojn tiel, ke kelkfoje li devis atentigi lin je la ĝusta paŝo. Sed Cezaro trankvile kaj supereme ludis plu, neniom zorgante pri tio, ke li perdas siajn figurojn unu post la alia, atentante nur tion, ke sian reĝon li loku sub sekuran kaj bonan ŝirmon.

Sed Jussuf ludis kun granda atento kaj obstina energio, zorgante nur pri tio, ke ĉiamaniere li ĉirkaŭfermu la

kontraŭulon, nenie donante okazon por sindefendo, tiom malpli por kontraŭatako. Kiam li estis preninta kelkajn el la figuroj de Cezaro per ruzaj artifiko, li komencis ruzan kaj zorge komplikitan kombanon, kies celo estis tia ĉirkaŭfermo de la malamika reĝo, kiun en la ŝako oni nomas "mato" kaj kiu signifas la finon de la ludo, la venkitekono de la kontraŭludanto.

Post duonhoru la kombino atingis sukceson, ĉirkaŭ la reĝo de Cezaro ĉiam pli malvastiĝis la ringo, unu "ŝako!" sekvis la alian, kaj foje stariĝis Jussuf, faris paŝon kaj diris: "Ŝako kaj mato! Vi perdis la ludon!"

Cezaro, kiu fajfetante tiris sian ĉirkaŭprenitan reĝon, trankvile suprenrigardis.

"Kial?" li demandis kaj ŝultrolevis.

"Kial!" indignis Ben Jussuf. "Rigardu do la tabulon. Via reĝo nenien povas iri; se tien ĝi iras, prenos ĝin la ĉevalo, se tien, prenos ĝin la kuriero; ĉi tien ĝi ne povas paŝi, ĉar ĉi tie staras via propra kuriero, kaj alia loko ne estas por ĝi sur la tabulo."

"Sur la tabulo ne estas," diris trankvile Cezaro, "sed jen estas, ekster la tabulo." — Kaj li trankvile prenis sian reĝon kaj starigis ĝin apud sin sur la rando de la tablo. — "Daŭrigu, Ben Jussuf."

"Vi, malfeliĉulo," ekkriis Ben Jussuf ekster si, "sed tien ne povas paŝi la reĝo."

"Vi vidas, ke ĝi povas."

”Sed ne laŭ la ŝakreguloj!” kriegis ekster si Ben Jussuf.

”Sed de nun ĉi tiuj estos la ŝakreguloj, tion mi ordonos!” Nun jam kriis ankaŭ Cezaro, li eksaltis, kaptis la glavon kuŝanta sur la tablo kaj mortigis Ben Jussufon.

La terurita ŝipanaro kapitulacis al Cezaro, kiu, kiel nova kapitano de la ŝipo, albordigis ĝin kaj la ŝarĝon vendis al normanaj komercistoj.

Senespera amo

Post ok jaroj, en aŭtuna tago, pro negoca afero mi ĵetiĝis denove en Berlinon, kie mi iam travivis la du plej belajn kaj plej malĝojajn jarojn de mia juneco. En la trajno mi okupis min pri miaj aktualaj aferoj, mi legis ankaŭ interesan studon — mi jam venis malsupren sur la ŝtuparo de la stacidomo Friedriechstrasse, kiam fine min obsedis tiu dolora kaj profunda humoro, kiu poste du, tri tagoj, dum mi estis tie, ne ĉesis eĉ por momento. Nun mi ne plu estas poeto, kaj mi ne povas esprimi la neesprimeblan: per fremdaj kaj malplenaj vortoj mi povas diri nur tiom, ke dum tiuj ĉi tri tagoj, ŝajnas, mi ne vivis en la estanteco, sed en la memoroj de tiuj du jaroj, kies koloron kaj parfumon mi perdis tiel nereporteble, kiel mortinto sian vivon. Kies manon oni detranĉis, tiu pensas eble kun tiel obtuza turmento kaj envio pri tio, ke iam, se oni batis lian manon, ĝi sciis dolori; tiel same mi memoris tiujn ĉagrenojn, kiuj hodiaŭ ne plu estas en mi — kaj pri kiuj nun mi eksciis, ke en ili estas entenata ĉio, kio estas en la vivo blindig-brile kaj morte bela, en ili troviĝis tiu pleno de la ekzisto, por kies unu momento

pasis miliono da jaroj, por ke klariĝu la *senco* de malpleno kaj ĥaoso: la juneco kaj fido je mi mem.

Tiu ĉagreno ne plu ekzistas, kaj mi, paŝadante sur Friedrichstrasse, pene meditis por reciti en mian memoron almenaŭ tiujn lokojn kaj eventojn en ilia sensignifa realo, al kiuj ĝi plektiĝis. En tiu kafejo mi sidis foje, atendante iun . . . tie, sub la ponto mi renkontis Dionizon, post lia sinmortiga provo . . . en tiu poŝtofiĉejo mi ekspedigis la plej belajn leterojn, kiujn mi foje nur sciis skribi kaj kiuj perdiĝis. Ĉio ĉi estis kune, sed obtuze mi sentis, ke ion, kio estas plej grava, kio kuntenas ĉion, ke ion mi forgesis.

Mi forgesis ĝin, sed ŝajnas, ke la sekreta, pli forta sento kaj volo de mia subkonscia memo klare sciis ĝin. Alie mi ne povas kompreni, kiel mi venis en la proksimon de Lessing-Teatro, kie malantaŭ fenestro de la kafejo en la mallarĝa kaj vulgara strateto subite mi ekvidis Felikson Stahl.

Certe mi senkonscie lin serĉis, kaj tute instinkte, ĉar ja kiel mi estus povinta scii, ke ankaŭ hodiaŭ li sidas ĝuste tie, ĉe la sama tablo, kiel antaŭ ok jaroj, ĉiutage? Kio okazis de post nia disiĝo al Felikso Stahl, tion mi ne sciis kaj eĉ ne povis scii — sed kiomfoje li venis en mian memoron, ĉiam, kvazaŭ memkomprenebla afero, mi decidis en mi, ke Felikso Stahl aŭ ne plu vivas, aŭ se li vivas, li ne vivas la vivon de homoj: eble li estas en frene-

zulejo, aŭ en monaĥejo, aŭ ĵetiĝis tamen en Afrikon, aŭ, kiel mi sciu, li ŝanĝiĝis je birdo, fariĝis vulturo, hieno, krokodilo, apro aŭ kio ajn. Tiun masivan kaj eksplodeman forton de vivo, de malluma, disŝira kaj malespera kaj senkonscia sopiro kaj sindono kaj ekstazo, kiu loĝis en Felikso Stahl, oni ne povis imagi kadrita en la fluon de tempo, tagoj kaj jaroj. Kaj nun, ekvidante lin, mi preferis forgesi, ke ok jaroj pasis de tiam kaj ke ne hieraŭ mi vidis lin laste, ol kredi, ke Felikso Stahl povis tratanĉi la rizmonton de tri mil tagoj kaj tri mil noktoj, ne bruliginte ĉion ĉirkaŭ si, la tutan mondon, kvazaŭ ardaĵo ĵetita en sekiĝintan arbaron — aŭ, ne dismetiĝinte, ne forvaporiĝinte kiel akvo kaj aero venintaj en faŭkon de vulkano. Sed jen, Felikso Stahl estis ĉi tie, kaj kun li tiuj du jaroj, la travagitaj noktoj, la frumatenaĵoj, la longaj silentoj, la senbridaj, nervozaj ridegoj pri imagitaj figuroj kaj grimacbildoj, kiujn ni desegnis ĉirkaŭ ni en la aeron, en kies eltrovo li estis nelacigebla kaj kiuj tiel svarmis ĉirkaŭ ni, kiel sur mezepokaj gravuraĵoj la inferaj monstroj kaj gnomoj kaj diablidoj.

Ankaŭ lia vizaĝo koloriĝis, kiam mi sidiĝis apud li. Li malmulte ŝanĝiĝis. Li dikiĝis, sed mirige, pro tio nur pli-profundiĝis la malnovaj kaj konataj sulkoj, — fositaj de tiu mania, obstina pasio, pro kiu la vizaĝo de Felikso Stahl kelkfoje kvazaŭ sekiĝis kaj rigidiĝis.

Komence ni parolis pri bagatelaĵoj: sed varme kaj kun subpremita ĝojo — mi sentis, ke de ok jaroj ankaŭ li neniu trovas por povi paroli pri si. Ni jam sidis kune duonhoron, kaj neniu el ni rimarkis, ke ni tute ne parolis pri tio, kio dume okazis al ni: kio ni fariĝis, kio estas nia profesio, ĉu ni estas malriĉaj aŭ riĉaj. Tio anoncis la malnovan harmonion, tiun intiman amikecon, kompare al kies enhavo niaj eksteraj vivo, aferoj kaj malagrablaĵoj estis tiel sensignifa kaj stulta bagatelo, ke neniam ni trovis inda oferi por ili demandojn aŭ vortojn. Ankaŭ nun, kvazaŭ urĝan kaj gravan demandon, tion ni aranĝis unue, kiaj estas nuntempe la homoj, kiom sanĝiĝis nia opinio pri tiu aŭ alia artista aŭ filozofia demando, kiajn signojn de maljuniĝo ni spertas sur ni, en kia rilato ni estas kun la vivo kaj la morto. Kelkfoje laŭte kaj nervoze ni ridis pri moka, trafa noto, per kiu ni karakterizis iun plenblovititan famulon aŭ stultan institucion. Subite mi rimarkis, ke ĉiam pli ofte li rigardas la horloĝon.

Kvazaŭ en tiu momento mi estus lin vere rekoninta: — ĉion mi rememoris.

”Vi ja intencas ien iri,” mi diris.

Li rigardis min, li volis eble diri ian stultaĵon, sed ne venis voĉo tra lia gorĝo, li forturnis sin. Min kaptis senfina kompatato kaj samtempe miriga envio. Mire mi rigardis: kiel rampiĝas liaj trajtoj, kiel li rigardas fikse antaŭ

sin, spiregante kaj mizere. Obeeme, per senkolora voĉo li respondis miajn demandojn.

”Ĉu ŝi estas ankoraŭ en ĉi tiu urbo?”

Li kapjesis.

”Ĉu pro ŝi vi sidas ĉi tie? Kie ŝi nun estas?”

”En la Lessing-Teatro.”

Mi rigardis mian horloĝon.

”Ni havas ankoraŭ kvaronhoron, mi rigardis la afiŝon. Ĉu vi volas iri tien, antaŭ la elirejon?”

Li kapjesis. Poste, post unu horo nur, kiam mi jam estis trans la surprizo, mi rimarkis, ke en tiu kvaronhoron mirige eĉ ne venis en mian kapon la demando, kio okazis inter ili de tiam laŭ la eksteraj aferoj, kiel evoluis, kiujn eventojn elvokis tiu pasio, al kiu simile belan, flagrantan, mizeran kaj malhonoran viro ankoraŭ ne travivis. Tiel nature estis, ke li sidas ĉi tie kaj nenio estas plu en la mondo, ne estas tempo kaj ne estas spaco, nur Hanna estas, ŝiaj malsane palaj manoj, sin lavantaj en viraj larmoj, ŝiaj nekompreneble bela kapo kaj mallaŭte susurantaj silkroboj. Tiel nature estis, ke li devas sidi ĉi tie kaj atendi, tra la jaroj, por ke por momento li povu ŝin vidi de malproksime aŭ rigardi la domon, pri kiu li konjektas, ke ŝi enestas, la straton, kie hieraŭ ŝi eble traglitis, la aeron, kiu libere ondas kaj susuras, eniras tra la ŝlosiltruo kaj senrimarke revenas: la vizaĝon de la portisto sur la stratangulo, kiun hazarde ŝi eble rigardis.

Miaj demandoj ne rilatis tion, ke mi eksciis, kiel statas nun ilia historio. Tion mi ja vidis, ke lia amo statas tiel, kiel en la unua momento, kiam li ekvidis Hannan — kiel tiam ĝi statis, kiam li eĉ ne konis, nur imagis ŝin — kiel en lia sesa jaro kaj en lia unua jaro ĝi statis: ĉar Felikson Stahl helpis en la mondon ne akuŝistino, sed la malespera sopiro je Hanna, Felikso Stahl nur tial naskiĝis, ĉar transe, en la mallumo de la neekzisto, li eksentis la parfumon de Hanna kaj esperis, ke foje, nur unufoje, li povos kisi la borderon de ŝia jupo.

”Ĉu vi parolis kun ŝi?”

Li kapjesis, sed mi vidis, ke lin ĝenas la demando. Al miaj postaj demandoj, rilatantaj al liaj renkontiĝoj kun Hanna, li donis mallongajn kaj sekajn, simplajn respondojn aŭ ne respondis. Mi tamen eksciis, ke foje venis al li Hanna, kaj tiam ili ankaŭ preparolis ion, ke ili iros ien, en Romon, kune, ke Hanna forlasos sian edzon, ĉion. Pri tio mi tre ekmiris.

”Hm! Ĉu eĉ tiom vi jam progresis? Ĉu ŝi volis kun vi fuĝi?”

Li rapide kapjesis.

”Do kiel okazis, tamen?”

Mi vidis, ke li suferas, ke ne volonte li parolas pri tio. Tion mi tiam atribuis al tio, ke la afero fiaskis.

”Ĉe la fervojo ni estus devintaj renkontiĝi. Tagmeze. Je la dekdua. Ĉio estis pakita. Mi staris tie. Atendante.”

”Nu kaj?”

Felikso Stahl subite saltleviĝis. Videble li ne eltenis ĉi tiun memoron.

”Kioma horo?” li demandis.

Ankaŭ mi stariĝis. Sed la historion tamen ni devis lini. Demande mi rigardis lin. Tiam li ruĝiĝis:

”Sekvontan fojon. Ĉu ankoraŭ ne estas la oka?”

Ni pagis kaj senvorte rapidis al la teatro, sub la historia flagro de la malafablaj gasflamoj. Oni jam estis elvenantaj: fiakroj kaj aŭtomobiloj bruis antaŭ la enirejo. Parfumaj ŝalaj fajreris inter la arklampoj. Li ekvidis ŝin unua. Li ne parolis, sed nur haltis kaj preme kaptis mian brakon. Li estis pala kvazaŭ morto.

Dudek paŝojn antaŭ ni, en nigra puntmantelo, facile rapidis Hanna al kaleŝo. En sia alte turumita, nobla hararo: brilanta diademo. Ŝia senŝanĝa beleco, kvazaŭ senborda insulo, ĉe kiu ne eblas albordiĝi, fortenis la vivojn tumultantajn ĉirkaŭ ŝi.

Felikso Stahl senmove rigardis ŝin. Mi ekscitiĝis.

”Nu venu,” mi tiris lin pasie, ”ne estu tiel stulta. Ni iru tien — ni parolu kun ŝi. Eble ŝi ankoraŭ memoras min. Ĉu vi do ne volas paroli kun ŝi? Ĉu vi ne volas, ke ŝi vidu vin?”

Senvorte li skuis la kapon, malrapide li venis kun mi kaj retenis min, kiam ni venis kelkajn paŝojn pli proksimen. Li ridetis, sur lia vizaĝo radiis transspiriĝinta, sen-

konscia feliĉo. Li klinis sin al mia orelo, nur tiel mallaŭte li povis paroli.

”Pro kio?” li flustris. ”Kial ŝi vidu min? Ĉu ne estas belege tiel, ke mi povas ŝin rigardi?”

Li jubilis, ridis en si.

”Nu? Kion vi diras? Rigardu — nun tie ni iras, kie antaŭe ŝi iris . . . Rigardu . . . rigardu, kiel ondas la mantelo . . . rigardu, neatingebla . . .”

Tremante li rigardis min.

”Se ŝi volus, ke mi tuj mortu . . . se tion ŝi volus! Se ŝi permesus . . .”

Mi ekkoleris.

”Ŝi ascendas veturilon . . . foriras . . . vi, stultulo . . . ĉu vi do ne venos tien . . . ? ŝi jam ekiris . . .”

Li retenis min. Silente, trankvile li staris kaj kapbalancis.

”Morte mi amas ŝin,” li diris simple.

Nun eble kvin minutojn senvorte ni iris unu apud la alia. Kiam ni atingis la bulvardon, ŝtele mi rigardis en lian vizaĝon, kaj surprizite mi vidis, ke ĝi estas tute trankvila, eĉ kvazaŭ enua. Li eĉ oscedis.

”Kie vi ekloĝis?” li demandis dum oscedo.

”Mi povas vin akompani,” mi diris.

”Bone,” diris Felikso per tute nova, fremda voĉo. Mi tiom konsterniĝis, ke mi devis halti. Nekonata homo staris antaŭ mi. Li nenion rimarkis.

”Ni povas iri piede,” li daŭrigis, ”ne estas malproksime. En la proksimo de la redakcio mi luis loĝejon.”

Kaj, ĉar en mia miro mi ne povis ekparoli, flue babilante li rakontis, ke li fariĝis redaktoro de granda ĵurnalo. Li eksplikis eĉ la programon de la ĵurnalo. Dume li elprenis ŝlosilon kaj haltis antaŭ bela, nova domo.

”Venu supren por minuto, poste mi iros kun vi, kien vi deziros. Mi nur diros al mia edzino, se ŝi jam estas hejme, ke mi ne vespermanĝos kun ŝi.”

”Ĉu vi havas edzinon?”

Mi ne aŭdis la respondon, la lifto ekiris.

En la antaŭĉambro de beleta loĝejo ni demetis la ĉapelon. Felikso antaŭeniris kaj parolis tra la pordo. Sufiĉe malvarma estis lia voĉo.

”Pardonu, ĉu dum vestado? Ne ĝeniĝu, kara. Mi nur volis diri, ke mi ne vespermanĝos hejme.”

La pordo malfermiĝis, kaj en simpla, uzita hejma vesto elpaŝis Hanna.

Mi ne memoras, kion mi balbutis, kiel mi falis sur seĝon, kion mi parolis kun Hanna. Mi rekonsciiĝis je tio, ke Felikso krude kaj senpacience ripetas ion kaj ke la edzino, kun mallevitaj okuloj, suferante silentas.

”Mi devas foriri, kaj mi rigardos ankaŭ en la redakcion. Nur kuŝiĝu trankvile. Morgaŭ mi denove alportos Sandron, kaj vi povos babili kune. Adiaŭ.”

Kaj jam sur la ŝtuparo ni iris malsupren. Mi ne kapablis paroli. Li ridis, sed sintrude kaj maleme.

”Mi ŝercis, stulĉjo. Kial vi faras tiel kurban vizaĝon.”

Post mallonge, senride li aldonis:

”Do jes . . . tiam, vi scias, kiel mi diris . . . ĉe la fervojo. Ne estas vere, ke ŝi sendis leteron . . . ŝi venis . . . kune ni foriris . . . de ses jaroj ni estas geedzoj.”

Fine mi retrovis la voĉon. Kolere kaj ofendite mi riproĉis, ke li ludis tiel stultan komedion kun mi, tie, antaŭ la teatro . . . humiligante min kaj ankaŭ sin mem. Oni ne mokadoras sian edzinon . . . aŭ, se jes, oni ne traktas ŝin tiel post horo . . . Kompatinda virino . . .

Tiam ni estis jam sur la strato, sub balkono ni staris, kaj nur nun mi rigardis lin. Pacience kaj kviete kaj senvorte li aŭskultis min, kaj sur lia vizaĝo revis la malnova, malnova sufero kaj malĝojo. Varme, malgaje kaj mole li ekparolis kaj suprenrigardis al la alto de la fenestroj.

”Mi ne komediis,” li diris kaj ridetis tiel varme kaj kareseme, kiel iu dormiganta infanon. ”Mi ne povas diri al ŝi, kiel mi amas ŝin — ŝi ja estas mia edzino. Neniam ŝi tion ekscios, ĉar ni ja estas ĉiam kune kaj mi ne povas kriegi tiom kvazaŭ fulmotondro — Hanna! mi amas vin! — kiel iam, kiam mi staris ankoraŭ sola sur monto kaj neniu aŭdis mian krion. Ŝi estas mia edzino kaj servistino, kaj oni devas ŝin trakti kiel edzinon kaj servistinon.

Sed sur la strato, foje, kiam ŝi ne vidas min kaj rigardas antaŭ sin, medite, malĝoje — kaj tra la ŝlosiltruoj kelkfoje, kiam silente ŝi laboras, mi rigardas ŝin tremante, la malnovan Hannan, la neatingeblan kaj sanktan, kiun mi ne meritas . . . kun la ununura kaj vera amo, kun la senespera — ĉar amo estas nur senespera amo.”

Longe ni ne interŝanĝis vortojn. Kvazaŭ iu parolus de malproksime, tiel frapiĝis al mi post kelka tempo lia obtuza, medita ĝemo.

”Se ŝi nur mortus . . . Bele, kviete mi aranĝus ĉion . . . mi ŝlosus la loĝejon, ĵetus la ŝlosilon en la Spreeriveron . . . silente irus en la tombejon . . . kaj tra noktoj mi plorus sur ŝia tombo . . . tie mi plorus libere, repaciĝinte, feliĉe, ke ŝi ne plu povas min aŭdi kaj aŭskulti — la malnova Hanna, kiu ĉi tie susurglitas inter ni, tra la stratoj de Berlin, ĉie kun milda kaj mistera rideto, metinte la fingron sur la buŝon, por ke ni silentu — la malnova Hanna, la juneco!”

Barabbas

Kaj en la vesperkrepusko de la tria tago Li paŝis tra la mallarĝa pordego de la volbo kaj silente ekiris sur la vojo. Ambaŭflanke nigre fumis la ruinoj. Sube, sur la fundo de sekiĝinta foso, Li trovis la unuan el tiuj, kiuj antaŭ la domo de Pilatus kriis la nomon de Barabbas. Kun nigriĝinta lango li blekis al la ruĝaj nuboj..

Li haltis antaŭ li kaj mallaŭte diris:

”Jen mi estas.”

Kaj tiu suprenrigardis al Li kaj komencis ploregi.

”Rabbi! Rabbi!” li ploregis.

Kaj la Majstro milde daŭrigis:

”Ne ploru. Ekstaru kaj venu kun mi. Ĉar mi reiros al Jeruzalemo, antaŭ la domon de Pilatus kaj petos novan verdikton pri mi kaj pri vi, kiuj elektis Barabbason kaj al kiuj Barabbas faris ĉi tion.”

Kaj la mizerulo pene leviĝis kaj kaptis lian baskon.

”Majstro!” li kriis sufoke kaj inter larmoj, ”ho, Majstro, mi venas! Diru, kiel mi savu min! Diru, kion mi faru. Diru, kion mi diru!”

”Nenion,” Li diris milde, ”nur tion, kion vi estus devinta diri antaŭ tri tagoj, kiam Pilatus ekstaris en la ves-

tiblo kaj demandis vin: 'Kiun mi do liberigu el ili, ĉu Barabbason la murdinton, aŭ la Nazaretanon?' ”

”Ho, mi frenezulo!” kriegis la mizerulo, batante sian kapon per pugno, ”ho, mi frenezulo, kiu kriis Barabbason! Barabbason, kiu venigis min tien ĉi!”

”Bone,” daŭrigis milde la Majstro, ”nun venu do kun mi antaŭ la domon de Pilatus, zorgu pri nenio, atentu nenion, nur min, kaj kiam mi signos al vi, kriiu el via tuta koro kaj el via tuta pulmo: 'La Nazaretanon!' kvazaŭ vi krius: 'mian vivon!' ”

Kaj tiu sekvis Lin.

Kaj ili trovis dumire alian mizerulon, de kiu Barabbas prenis la domon, la edzinon kaj la infanon kaj elpikigis la okulojn. Kaj Li silente tuŝis lian frunton kaj diris:

”Estas mi. Venu kun mi Jeruzalemon, kaj kiam mi tuŝos vin mane, kriiu: 'la Nazaretanon!' kvazaŭ vi krius: 'mian domon! mian infanon! miajn okulojn!' ”

Kaj tiu ekploregis kaj sekvis Lin.

Kaj ili trovis ankoraŭ alian homon, kies manoj kaj piedoj estis ligitaj per ŝnuro kaj maŝitaj al lia kolo, kaj lin mem kun renversita kapo Barabbas estis preminta en putrodoran marĉon, inter vermojn kaj rampaĵojn. Kaj Li aliris, malligis liajn ŝnurojn kaj diris:

”Mi konas vin. Vi estis poeto, kiu anoncis la ekstazan flugon de la animo. Venu kun mi, kaj kiam mi mansig-

nos, krii: 'la Nazaretanon!' kvazaŭ vi krius: 'la liberecon! la liberecon de la animo kaj penso!' ”

Kaj tiu kisis lian sandalon kaj petegis nur per la okuloj, ĉar lia buŝo estis ankoraŭ plena de koto.

Kaj tiel ili pluiris, kaj ĉiam pli kaj pli multaj kripluloj kaj lamuloj kaj mizeraj lepruloj aliĝis al ili, kiujn Barabbas malfeliĉigis. Kaj ĉiu el ili aparte batis plorege sian bruston kaj petegis al Li, ke Li signu, kiam ili devos krii: "la Nazaretanon!" kvazaŭ ili dirus: "pacon! pacon! pacon sur la tero!"

Kaj vespere ili alvenis Jeruzalemon, antaŭ la domon de Pilatus.

Pilatus sidis en la vestiblo kaj vespermanĝis kun Barabbas, la murdisto. Grase kaj kun brila vizaĝo ili sidis tie, trinkis pezajn vinojn kaj manĝis karajn manĝaĵojn el la fundo de oraj vazoj: ilia skarlat-ruĝa talaro brilis malproksimen.

Kaj la Nazaretano, gvidante la homamason, kiu lin sekvis, iris antaŭ la vestiblon, kaj levinte siajn tranajlitajn manojn, milde Li ekparolis:

"La festo de Pasko ankoraŭ ne pasis, Pilatus. Estas leĝo kaj kutimo, ke paske unu el la kondamnitoj vi devas liberigi, tiel, kiel la popolo deziras. La popolo deziris Barabbason, kaj min vi krucumis — sed mi devis reveni el mia morto, ĉar mi vidis, ke la popolo ne sciis, kion ĝi faras. Ĉi tiu homamaso post mi ekkonis Barab-

bason kaj nun volas novan verdikton, — demandu ilin denove, kiel estas skribite en niaj leĝlibroj.”

Kaj Pilatus enpenŝiĝis, poste ŝultrolevis kaj, stariĝinte sur la rando de la vestiblo, mirante trarigardis la homamason kaj diris:

”Do kiun mi nun liberigu, Barabbason aŭ la Nazaretanon?”

Kaj tiam Li mansignis al ili.

Kaj tiam ekestis muĝo, kaj kvazaŭ fulmotondro sonegis la homamaso. Kaj la homamaso kriis: ”Barabbason!”

Kaj terurite ili rigardis unu la alian, ĉar aparte ĉiu el ili kriis: ”la Nazaretanon!”

Kaj la Majstro paliĝis kaj sin turninte rigardis ilin. Kaj aparte li rekonis la vizaĝon de ĉiu, sed el ĉi tiuj multaj vizaĝoj fariĝis unu sola vizaĝo en la vespera krepusko, giganta kapo, kiu stulte kaj malice kaj impertinente rikanis en lian vizaĝon, ĝiaj sangaj okuloj palpebrumis, kaj el ĝia buŝo fluetis fetora suko, kaj el la gorĝo ĝi blekegis raŭke: ”Barabbason!” kvazaŭ ĝi stertorus: ”morton! morton! morton!”

Kaj Pilatus embarase mallevis siajn okulojn kaj diris al Li: ”Vi vidas . . . !”

Kaj Li ekbalancis la kapon kaj, silente ascendinte la ŝtuparon, etendis la manojn al la ekzekutisto, ke li ligu ilin.

Delonge

Iun posttagmezon sur la silenta sablo de la granda lago, en brulanta sunbrilo — dum foraj veloj glitis sur la akvo kaj en la proksimo krakis motorboato — jene mi provis balbuti al ŝi ĉi tiun senton, kiu tiam min atakis unuafoje: ĉu la krakado, la fora velo, aŭ la eterna flagro de la sunbrilo ĝin vekis, mi ne plu scias tion.

”Kara mia, ĉu vi scias, kiel *delonge estas* ĉi tie tio, kio nun *estas*, kune kun ni, kiam ni banas nin en la suno? Ne, vi ne komprenis min, — la vortplekto ‘delonge estas’ signifas vere ion alian, ol kion mi volas diri, — kaj kion mi volas diri, por tio ne ekzistas vortplekto. Ne tion mi volas diri, ke jam delonge ekzistas ĉio ĉi, ke la mondo delonge ekzistas; — *delonge estas*, tion mi diris anstataŭ tio, ke delonge *estis* — ion tian mi imagas, atentu do, ion tian, ke, ekzemple, se iu post ducent jaroj povus sin returni en la pasintecon kaj nin vidus, aŭ se ni ambaŭ, post dudek jaroj, rememorus, kiel ni kuŝis kaj babilis ĉi tie — ke por li kaj por ni ĉi tiu momento, ĉi tiu imago, ĉi tiu realo, tiuj ĉi du homoj, la lago, la velo, la motorboato, ĉi tiu brulanta suno, kiel kunfluis, en kian sorĉan, ravan, al neniu alia sentimento kompareblan sentimen-

ton de tiu sento, kiun ni nomas: *'la pasinteco'*. Ĉar tio, kio estas nun, estas same pasinteco por la homa imago vivonta iam, post ducent, tricent, mil, dumil jaroj, kiel estas rava kaj sorĉa pasinteco, por nia imago, iu pentraĵo de Boucher, figuranta Versailles-an paŝtistoscenon, malnova gravuraĵo en gotlitera, ripranda malnova libro, antikvaj vestoj, armiloj en muzeo, malnovviena porcelano, mucida manuskripto sur bruna, rompiĝema papero, klakanta klavo de grince malfermiĝanta, svelta spinedo, skribaĵo de malnovaj vojaĝistoj. La *'Sentimentalaj vojaĝoj'* de Sterne, la italaj leteroj de Goethe, la taglibro de Beaumarchais el la franca revolucio, la vojo de Gvadányi en Pest-Buda, la libreto de Ladislavo Apor pri la socia vivo de Transsilvanio, la historio pri nia praavino en la familio: — memortabulo sur muro, la tombo de Gül-Baba, la restaĵoj de la akvokondukilo en Aquineum, la kolono de Trajano, la Koloseo, medaloj kaj moneroj, malnova trovaĵo, ĉi tie ie sur la bordo de la lago, kiun blankfelt-ĉapela esploristo tenas en la mano meditante, dum antaŭ liaj okuloj ekviviĝas la malnova homo, eble la servisto rapidanta al foiro, kiu estis faliginta ĉi tiun monon, iom serĉinta ĝin, poste foririnta kaj nun jen, oni ĝin trovis . . . Ĉu vi jam sentas? Ĉu, se restus nia postsigno ĉi tie en la sablo, se oni fotografus nin kaj konserve la bildon, — se nun mi prenis mian notlibron kaj skribus naive, fidele, simple, kion mi vidas ĉirkaŭ mi, kaj

tiujn kelkajn eventojn, kiuj hodiaŭ okazis al mi, kiel ni venis per trajno, per ŝipo, kion ni manĝis, kun kiu ni parolis, kion ni diris, kian veston ni surmetis, kiu kaj kio nin interesis, kion ni scias, kion ni volas, kion ni sopiras, kion ni memoras, kion ni pretendas de la estonto: — ĉu, se iu vidus, legus iam, post tricent, kvincent aŭ mil jaroj ĉi tiun noton kaj meditus pri la malnova bildo, — *kio estus do tiu io*, tiu trajto, tiu nuancdiferenco, tiu kuriozo, pri kiu ni nun ne scias, kio por ni estas natura kaj per kiu li unuamomente rekonus la stilon de la *delonge pasintaj* tempoj, la tombej-odoron? Ĉu nur nia vesto — aŭ ankaŭ io alia? — niaj movoj, nia rideto, kiun ni kredis supera kaj kiu estas naivega kompare al lia rideto, jam entenanta la konojn de kvincent de ni nekonataj jaroj? la koloro de la velo, kiu vidiĝas, — aŭ la motorboato, ĉi tiu primitiva, naiva komunikilo, — aŭ supre, en la aero, la aeroplano nun preterglitanta, ĉi tiu krakeskua, infana, naiva ĉarpentaĵo, antikvaĵo rememoriganta la praepokon de la fluganta homo, kiun li rekonus per ĝia modelo montrata en la muzeo? Aŭ plie — mi opinias, multe plie — la *tono* de la priskribo, la strangaj, malnovmodaj interpunkcioj, por li superflua aŭ tro malvastaj epitetoj? naiva vortmalŝparo, ridinda, ne lokkonvena patoso? pia senscio? *Kio estus do tio*, pro kio kun pardonema kaj patra rideto (ĉar la posteulo, multe pli scianta, *anime* estas ĉiam patro de la antaŭulo) li jene

ekkrius: 'Ho jes, ĉi tiuj karaj, malnovaj, malnovaj homoj . . . ! Kiel feliĉaj ili estis en sia nescio . . . Jes, mi jam scias, la komenco de la dudeka jarcento . . . jes, li ja asertas, ke . . . ĉar en tiu epoko oni ankoraŭ ne sciis, kion nur dum la mezo de la jarcento malkovris la homaro, ke . . . ' kaj tiel plu, kaj tiel plu.

"Jes, jen estas, kion mi nur tiel povas nomi: 'delonge estas'. En la kuregantaj ondoj de la tempoj ĉiam, ĉiam la kreiganta pasinteco, memoro por iu, kiu ankoraŭ ne estas, — imago pri iu, kiu ne plu estos . . . Fantomoj de malnovaj, cindriĝintaj jarcentoj estas ni ambaŭ . . . ni ne vivas, ne kredu . . . ni estas nur pasema vizio de la venonta fantazio, al ĝia ekpenso aŭ pasio plaĉis nin citi por kelkaj momentoj . . . venu do, praavino de viaj pranejoj, disfluema bildo, — ni rapidu, subiras la suno."

Tion ni ludis poste, la 'delonge estas'-ludon dum kelkaj minutoj, dum tiu vespero, ridante kaj mirante, — kiel *malnovaj, malnovaj, malnovaj* aferoj estas ĉi tiu lago, ĉi tiu kaduka velo, ĉi tiuj malnovaj geamantoj — kaj kian feliĉon ni havas, persone ĉeesti ĉi tie, el la dudeksepa jarcento kaj vidi ĉion — kun la vivanta gusto kaj vivanta aromo de la pasinto, kiujn ne povas doni priskribo — kaj kulturhistorio. Kaj tiel ni promenis sur la lagbordo, brakplekte, kvazaŭ en muzeo.

Tion ni ludis tiam dum kelkaj minutoj kaj ridis pri ĝi . . . sed post kelkaj minutoj ŝi serioziĝis kaj kolerete ŝultrolevis kaj piedfrapis.

”Lasu jam, ĝi tedas . . . Do ĉio estas nur pasinteco . . . kaj ĉio estas nur estonteco . . . do, mi jam foje volas ludi *nun estas-on* . . . la estantecon mi volas ludi, — ĉar tiomfoje ni parolis pri la pasinteco . . . kaj tiomfoje pri la estonteco . . . sed ankoraŭ neniam vi atentigis min, ke mi atentu . . . jen la nuntempo . . . Nu diru, kiam estas ĝi . . . ?”

Mi rigardis en ŝiajn okulojn: ŝiaj okuloj malpacience petegis kaj postulis. Stulte, konsternite mi ridetis.

”Eble . . . kiam . . . vi naskiĝis . . . al mi . . . tiam . . . aŭ antaŭ unu momento . . .” mi pene elĝemis.

Malkontente tiriĝis ŝia sultro, ŝiaj okuloj nebuliĝis, kaj ŝi preterrigardis.

”Aŭ eble . . . tiam . . . en tiu momento . . . kiam vi mortos . . .” glitis el mia buŝo: mi kredis, ke ion alian mi diros.

Ŝi ne respondis, per larĝe malfermitaj okuloj ŝi rigardis fikse antaŭ sin. Post multaj jaroj ŝi rigardis min ankoraŭ unufoje per la sama rigardo: kelkajn minutojn antaŭ ol oni fermis ŝiajn okulojn. Eble ŝi volis komuniki al mi, ke ŝi jam venis al tiu momento, al la momento de la ĉiam ĉeestanta morto.

La unua almozpeto

Ankaŭ la deka 'kartoĉo' fiaskis, kaj Kovács malvarme, kun malplena koro konstatis, ke ĝi estis la lasta, nenio plu: dum dek aŭ dek kvin tagoj li eĉ ne havos novan, kaj ĝis tiam li simple malsatmortos, tiel simple kaj nature kaj klare, kiel seka folio falas de arbo aŭ kiel guto da akvo sekiĝas kaj malaperas sur la ŝtono, sen ke okazus io, sen ke iu malhelpus tion, sen ke iu mirus aŭ malesperiĝus pri tio, — ja, kiam li miris, ke la muŝoj falas aŭtune? aŭ ke vespere la rivero, apud kiu ili loĝis, kuntenas ŝvelbloviĝintajn bestkadavrojn, aŭ fiŝoj kun brilantaj ventroj maldronas senvive? Neniam li provis malhelpi, ke ĉio ĉi okazu, — kiel li do povus pretendi, ke nun animoj rapidu por lin helpi, animoj de herboj kaj floroj kaj homoj kaj muŝoj, kiuj iam sin kaŝis en viva korpo, timante, tremante; en korpo, kiu poste forputris de ili, ĉar neniu ĝin nutris, — kaj nun frostotremante ili torĉiĝas denove en la malluma malpleno.

Tiel estis, ĉar ankaŭ la deka 'kartoĉo' ne funkciis. Li nomis 'kartoĉo' tiujn elpensaĵojn aŭ eblojn aŭ ŝancojn, per kiuj mono estus akirebla, kiujn ĉiumatene li prialkulis, vicigis, aranĝis laŭ valoro, registris per turmenta,

kapdolora cerblaboro, por ke ili ne refalu en forgeson. Matene li devis trastreki tri el ili: oĉjon Weiss, la patent-oficejon, la firmon Koltay. Poste evidentiĝis, ke ankaŭ la redakcio ne estas bona, X. Y. kaj Z. V. forvojaĝis, kio restis do ankoraŭ? Gerber memoris nenion — kaj la komandojn oni translokis. Kaj nun fine la lasta, post kio sekvas nenio — la direktoro, kiu simple ne akceptis lin.

Prete. Li venis sur la korson, per rapidaj kaj gravaj paŝoj, kiel iu havanta urĝan aferon. Post kelkaj minutoj mirante li devis konstati pri si, ke li tute ne fartas malbone. Li ĝojis, ke li ne havas pliajn 'kartoĉojn', ke li povas forĵeti la tutan preman, turmentan zorgon. La fermbuŝa kaj malvarmokula indiferento en la grize muelanta enuo de la Danubo kaj inter la mirantaj ornamaĵoj de la domoj frapis lin, lulis kaj torporigis lin. Tiom neniu zorgis pri li, tiom neniu li interesis, ke ankaŭ li perdis la interesiĝon pri si, kaj tio estis bona, kvazaŭ kiam kun subita decido oni disŝirus la rilaton kun malnova kaj ŝarĝa kaj kaprica parenco, kiun oni devis vivteni. Li rekonis la grandiozan politikon de la vivo en tiu saĝa aranĝo, ke la homo ne sentas kompaton al si mem, ne gardas sin kun tiu spasma, dolora turmento, kiel iun alian parencon, infanon, edzinon oni gardas time. Li preskaŭ ridetis, ke ĝis nun li ne rimarkis tion. La rezonanta scienco trumpetas ĉiam pri sinvivtena instinkto, kiel pri io, kio estas plej forta, — sed kiu do vidis agoniantan beston

barakti tiel malesperiĝinte, lukti tiel kun la morto, kiel la kokino defendas siajn etajn kokidojn? Eĉ plori oni ne vidis agonianton, se nur ne por tiuj, kiujn li devis forlasi.

Tiel estis. Li ne havis kompaton al si: sin, kiun lorlasis Dio, homoj kaj naturo, forlasis ankaŭ li mem, sen adiaŭo, malvarme, preskaŭ malŝate. Tiel, tia li vidis sin, kia lin vidis la fremda mondo: fremda, malplena, seninteresa, — truita, kaduka kokono, el kiu elflugis la papilio, senkerna frukto, rubo por forĵeto. La etaj malsato, soifo, kiuj ankoraŭ lumetis en tiu mallumo, ne lumigis lian vojon, malsanaj kaj favaj estis ankaŭ ili, kiel la tuta homo, ili ne donis forton por ŝiri kaj diskarni ĉirkaŭ si, rabi, se necese, en la angulo, kien oni enpremis lin. Imagoj ekkrepuskis, lia vivo. Lernejo, universitataj jaroj, sentimentala amo — sinofero de viro kaj virino, pri kiu evidentiĝis je la fino, ke, sub la masko de ekstazaj kisoj, suprenturnitaj okuloj kaj larmosolvita adoro, estis la plej seka, plej kalkulema interbatalo je vivo kaj morto, pri venko kaj potenco super la alia, sencele, nur por la potenco, — ĉar ili, kiuj reciproke parolis pri la perfekteco de la alia, ambaŭ atendis, ke tiu alia pereos kaj simple krevos en sia amo, pruvante per tio, kia potenco kaŝiĝas en la vekinto de tiu amo. Ami — kio alia estas ol voli la bonon por la alia?

Sed, kiu kuraĝas diri, ke la geamantoj volas bonon unu por la alia, per unu brako ĉirkaŭprenante, en la alia premante tranĉilon inter la faldoj, por piki kore la 'mal-fidelulon': tiun, kiu volas ĝoji ankaŭ per *iu alia*, ne nur per li. Kaj tiel plu — sensenca, terurita kaj teruranta, malkaŝa kaj kaŝita lukto pro la potenco, kiun ne certigas tio, ke *mi* havas ion — sed nur tio, ke *vi ne havas*. La vorton: 'mia' pli rapide lernas la infano, ol la vorton: 'mi' — kaj tiel plu, plu. Poste la milito — malgranda potenco kaj granda potenco, kaj kio ankoraŭ? Freneziga atako de vortoj kaj ideoj — ho, kiel oni forfalis apud li antaŭe anime, poste korpe — kaj la frenezo de la revolucioj, — morti por io, por kio eĉ vivi ne indas — esti punata unuflanke pro tio, kion oni honoras aliflanke. Ĉiujn liajn penson, decidon, kredon, kiujn li volis ŝanĝi je agoj, oni mezuris kaj pritaksis — kaj kiom da pesiloj, tiom da juĝoj de la leĝo: unu lin trovis tro malgranda, alia tro granda, unu lin akuzis je graseco, alia je malgraseco, al unu li estis peza, al alia malpeza — ĝis duonfreneze li komprenis, fine, ke ankaŭ la pesilo estis ĉiam same animo, kiel tio, kion oni mezuris per ĝi: lia animo; ke la leĝo, kiu juĝis pri li, bezonis juĝon tute same, ĉar ĝi ja ne devenis de supre, sed naskiĝis tie, el la naskodoloroj de la homaj cerboj similaj al tiu de li.

Estis preskaŭ ridinde, tiel simpla tio estis. Li haltis. Kion li povas ankoraŭ esperi, kion atendi de ili, kiajn

komprenon, indulgon, estimon, helpon? Kaj kion de supre, kian manaon falantan antaŭ lin el la nuboj por savi lin — kian miraklon? La bluan ĉielon, la stelan senfinon, la tutan universon, de kie devus veni la miraklo, li ja konas ne el la realo, nur el tiu eta globo, kiu ŝvebas super la gelateno de liaj okuloj — nur el lia putrema cerbo, kiu jen deformiĝas kaj malklariĝas, tuj kiam ne puŝas en ĝin sufiĉan sangon la malsatmurmura stomako. Aŭ la ekziston de mia intelekto mi neas, aŭ tiun de la mondo, ili ambaŭ ne povas esti realaj. Sed la intelekto ekzistas, ĉar doloras — kio alia do estas la mondo, ol la turmenta inkubo de ĉi tiu doloro? La homaj intelektoj kreis la mondon —, kiel li do atendu de ĝi miraklon, se la intelekto ja ne kredas je mirakloj — ne kredas kaj ankaŭ ne kreas?

Ni estu do prudentaj, li diris al si kaj kvietiĝis. Tiam mi estas, kiam estas kiu ajn el tiuj ĉi — mi vidis ilin fali, kaj mi ne miris: ankaŭ mi do devas fali. La bildo ekbrilis antaŭ li, el la zologia libro, el kiu ili lernis en la tria klaso. La figuro de iu mambesto, li ne plu sciis de kiu, eble de lutro, aŭ de kastoro. Gaje ĝi saltis sur iu akva vegetaĵo. Kaj sub ĝi la teksto: ĝia viando estas bongusta, el ĝiaj ostoj oni kuiras gelatenon.

Ĝia viando estas bongusta, el ĝiaj ostoj oni kuiras gelatenon. Ĉi tio krozis en lia kapo kaj nun jam kun grinçantaj dentoj kaj kunpremita pugno li blasfemis en si.

Prenu min, li diris, jen mi estas, kion vi volas ankoraŭ de mi? Amaso da ruboj, ĉiuspeca materialo, uzu ilin por io, mi ne plu povas ilin uzi. Estas ankoraŭ iom da malhelpo, ĉi tiu viand- kaj ostamaso havas iom da valor-malpliiga eco: ke ĝi vivas, baraktas, kantraŭstaras — sed ankaŭ tio ne plu daŭros longe. Kaj tiam do manĝu ĝin, se por alia celo ĝi ne taŭgas. El miaj haroj plektu ŝnuron, el miaj ostoj kuiru gelatenon. Uzu ilin por iu industria celo, domaĝe estus lasi ilin putri en ĉi tiu multekosta mondo.

Li haltis. Libera teraso de kafejo estis la loko, flanke barilo, apud ĝi tabloj. Ĉe tablo, ĝuste antaŭ li, sidis alta viro apud diketa, blonda virino: ili trinkis bieron kaj manĝis je ĝi kolbason. La viro klarigis, ke Marienbad estas pli bona, sed se ili irus al la lago Balaton, tio havus la avantaĝon, ke dum la tuta somera ili povus esti kune kun gesinjoroj Sándor, kaj onklina Karolina . . .

La lastajn vortajn li ne plu aŭdis. Bona, silente nebuliĝanta, zumanta sento venis, infanaĝ-devena, antaŭdorma sveno. Nur tiam li aŭdis ankoraŭ, kvazaŭ iu laŭte dirus apud li: 'Ili havas, kaj vi ne havas'. Kaj sento de senfina danko al la plenaĝuloj, al paĉjo kaj panjo, kiuj donas; al multaj bonaj, laborantaj, luktantaj, batalantaj, konstruataj kaj detruantaj plenaĝaj homoj, kiuj konstruis domojn, faris pontojn, kolektis monon, rulis barelojn, parolis kun serioza basvoĉo, pritraktis, aranĝis, komencis kaj finis — dum li dormis kaj sonĝis! Kaj nun,

kiam ĉi tie, sur la rando de la barilo de la kafejo, kvazaŭ ĝi estus la rando de lia liteto, li vekiĝis al la realo, post sia terura songo kaj timiĝinte ĉirkaŭrigardas — ho, kiel bonaj kaj plenaĝaj kaj maturaj ili estas — ho, ke li ne sciis esti bona kaj indulgema!

Varma larmo de la danko ekfluis el liaj akuloj, kiam li etendis la manon — li estis certa, ke li ricevos ion. Kaj jam anticipe li diris varmege kaj tremvoĉe:

”Dio repagu . . .”

Kaj preminte la manon al la koro, ridetante li rigardis tion farirante. La alta viro postrigardis lin kaj distrite diris, kial tiel fortaj homoj ne serĉas laboron.

Virhonoro

*"Indignigo devas esti
— sed ve al la indigniganto."*

(Biblio)

Post tio ĉio jam okazis rapide, kvazaŭ dum minutoj, kiel bonsukcesa eksperimento, kiun zorge kaj precize oni preparis en laboratario: kun varmega ambicio de malvarma scienculo, por ekkoni Leĝon.

Paŭlo rigardis sian horloĝon, ekbruligis la malgrandan lampon, estingis la grandan, metis la florojn sur la mezon de la tablo. Poste li aliris la telefonon.

". . . kvindekseka . . . jes . . . Johano . . . ĉu vi estas . . . ? ĉi tie Paŭlo . . . bonvolu tuj veni en mian loĝejon. Nenion demandu, tuj venu en mian loĝejon. Post kvin minutoj vi devas esti ĉi tie."

Li sidiĝis, provis rideti kaj iom miris, ke li ne povas. Johano post kvin minutoj estis tie.

"Bonan tagon."

"Bonan tagon."

Li tuis, poste varme kaj trankvile li rigardis en la okulojn de la alia viro, — en la sereno de lia voĉo estis an-

kaŭ kompato tamen, tiom, kiom necesis, ke li povu meti la manon sur la ŝultron de sia amiko.

”Do, kara mia. Pri virhonoru, virsolidareco mi parolis al vi, pri la amikeco, kiu donas forton en la tento, kiu estas pli forto ol la vanteco. Vi dubis. Nun eble vi ne dubos. Atentu bone, prenu viajn fortojn. Via edzino post kelkaj minutoj estos ĉi tie en mia loĝejo.”

Li atendis, ke la alia malkonsciiĝu. Eĉ seĝon li ŝovis sub lin. Nur poste li daŭrigis.

”De jaroj mi diras al vi, ke ĉi tiu virino ne konvenas al vi. Mi sciis ankaŭ, ke tion pli aŭ malpli frue vi devos rekonu, — mi volus al vi ŝpari, ke sensacio kaj skandala katastrofo vin devigu al ĉi tiu rekono, kiu malutilus al vi ankaŭ de ekstere, — mi do decidigis min, ke la operacion, kiu ne estas evitebla, faras mi mem, pure kaj rapide, kiel kuracistoj, asepse, kun pura bandaĝmaterialo. Ĉion mi bone preparis, kiel vi vidas. Vian edzinon mi devis amindumi tre malmulte, kiel mi ja antaŭsciis. Antaŭ unu semajno mi komencis ŝian prilaboron, kaj por hodiaŭ ŝi jam faris promeson. Nu, kio do, — kial vi ne parolas? Ĉu vi fartas malbone?”

Raŭka, obtuza voĉo.

”Ne, mi dankas. Nur, jes, jes . . . kion mi devas nun . . . ?”

”Vi iros tien en la alian ĉambron kaj atendos. Kaj se vi tion trovos bona, vi elvenos, kiam mi faros signon. Vi

povas fidi al mi: mi estos trankvila kaj fidela al vi, kiel en ĉi tiu momento. Venu — mi gvidos vin. Tiel. Sidiĝu ĉi tie, proksime al la pordo.”

Zorgeme li fermis la pordon. Kiam li estis veninta en la mezon de la ĉambro, oni sonorigis. Ĝustatempe.

Kaj ĉio ruliĝis kvazaŭ oleita rado.

”Paŭĉjo . . .”

”Bonvenon, Olga. Atendu — mi helpos demeti la surtuton.”

”Ĉu mi estis akurata?”

”Jes. Ankaŭ mi.”

”Ĉu ankaŭ vi? Kiel mi komprenu tion?”

”Neniel — oni vidos. Tien ĉi . . . jen mia ĉambro. Sidiĝu!”

”Sur la kanapo — ĉu vi permesas?”

”Jes, nepre.”

”Kiel ĉarma estas via ĉambro . . . Kvazaŭ eta nesto.”

”Jes.”

”Ĉu vi amas min?”

”Jes!”

”Bone . . . sed kial vi tiel krias? Ĉu tion oni povas diri nur tiel laŭte . . . ? Tion oni devas diri mallaŭte . . . tute proksime . . . al mia orelo . . . ne al mia orelo . . . al mia buŝo . . .”

”Jes . . . !!!”

”Kio estas?! Kial vi kriegas ĉiam pli laŭte? Eh, kiel strange . . . Kio estas . . . kiu estas ĉi tie . . . ? Al kiu vi kriegas?”

Kiam ŝi ŝirmalfermis ĝin, la edzo jam staris en la por-do. La ŝtono, antaŭ ol fali, ŝvebis kelkajn momentojn super ilia kapo, ĉe la rando de la eksperimenta artimpro-vizaĵo, en la morta punkto. Eble duonminuton daŭris, ĝis ĝi ekfalis.

”Johano . . . vi . . . sed tiel do . . . ĥa — ĥa — ĥa! Nu jen — vi komplotis! Bona ŝerco . . . !”

Silento.

”Nu, nu. Tamen ne faru tiel teruran mienon . . . ĉu vi ne hontas . . . tia malsaĝa ŝerco . . . kun mi . . . ! Nu . . . ! ĉu vi ne ridas?”

”For de mi! Mi ne volas vin plu vidi!”

Krieto, bruo, koleratako, larmoj, malbenoj, minacoj. Poste, post kiam la virino forkuris, ree estiĝis silento. Paŭlo apogis sian amikon sur la ŝtuparo, ĉar li malfacile iris. En la pordego li apogis lin al la muro kvazaŭ kiel objekton: li mem rapidis por venigi kaleŝon. Elaste li revenis, vigle, plena de fervoro, kaj konstante li parolis.

”Bone, nu, bone, nenio okazis. Nun bele mi vin hejmenportos, vi kuŝiĝos. Pasos la tuta malbona sonĝo. Jam hodiaŭ vi komencos la eksedziĝproceson — facila estas la afero — malfideleco . . . Nu, kio do, parolu do . . . Sidiĝu ĉi tie en la kaleŝo . . . Sed do, kial vi ne parolas? Kiel

stranga vi estas! Mi kredas ja, ke tio doloras, sed al *mi* tamen vi povas paroli. Nu! al via amiko . . . ! kiu *tion* faris por vi . . . ! Por sanigi vin . . . ! Por helpi, ke vi trovu vin mem . . . ! Nu, kio do . . . ? Kial vi volas eliri . . . ? Kien vi iras . . . ? Ĉu vi ne volas hejmeniri . . . ?”

”Jes ja, mi hejmeniros.”

”Do kial vi eliras?”

”Ĉar mi volas iri piede.”

”Ĉu ni iru piede?”

”Mi iros piede.”

”Vi iros? Ĉu ne kun mi?”

”Mi iros piede.”

”Ĉu vi ne volas iri kun mi?”

”Ne.”

Paŭzo. Paŭlo iom post iom ruĝiĝas.

”Ĉu vi kredas, ke mi ludis komedion? Ke mi trompis?”

”Ne.”

”Ĉu vi ne kredas, ke tiel mi aranĝis la tutan aferon, pro vi, por vi?”

”Jes, mi kredas.”

”Ĉu vi dubas pri mia bonfido?”

”Ne.”

”Ĉu mi faris al vi malbonon?”

”Ne.”

”Ĉu ne estas bone, ke ĉesis via blindeco, ke vi estas libera, ke vi estas fine via, ke vi ekkonis la veran fidelecon, ke vi havis veran amikon?”

”Estas bone.”

”Ĉu vi ne sentas vin pli bona, pli fiera, pli forta, savita?”

”Jes.”

”Do kion vi volas de mi? Ĉu vi ne sentas dankemon?”

”Jes, mi sentas.”

”Do kion mi faru?”

”Forportu vin, mi ne volas vidi vin plu.”

Anasrostaĵo

I.

Jene okazis, mi vidis.

En la senfina spaco senbrue turnis sin la mallumaj diskoj: trans la horizonto supreniĝis Luma Realo, kiun oni povas nur koni kaj ne rigardi. Komenciĝis la koncerto: unue mallaŭte, poste kun pli kaj pli aŭdaca, pretendema gajo. Komencis ĝin la Krestulo, longa, kavalira kikeriki — poste ekgruntis la porkoj. Poste gagaga kaj kluk-kluk-kluk — post kelkaj minutoj vivis la korto, ŝmacis la koto, en la trinkvazo plaŭdis la akvo, kirlis ĝin ŝmace-klakaj bekoj. Tra la palisoj de la barilo aperis Granda Plumulo kaj Etaj Lanugoj, ĉirpadante, kun febra gravumado.

Estis mateno, mateno de la ĉiam renoviĝanta, eterna, senfina Vivo kaj Ekzisto — sango kaj sopiro en la vejnoj, kaj en la kropoj la bongusta, glutema prepariĝo por la pisto de la pala hordeo, la flava maizo. Subite Li projektis por si la plej proksimajn agojn — tuj kiam Senflugi-la Gigantodio portos posten la du Grasiĝintojn (en tiujn oni perforte ŝtopas la maizon), Li transŝtelos sin inter la palisoj: antaŭe la trinkvazo, poste serĉado sub la morusujo, rapide, ĉar Blukapulo estos denove pli rapida, for-

kaptos ĝin antaŭ Li. Poste batalo kun la anseroj, lastatempe ili fariĝis tre perfortaj. Poste sin bani en la varmega brilo, kun plenigita kropo — poste eksteren tra la pordego, suben al la rivero, tra la junkejo, — eble ĉi tio estas la plej bela ĉapitro de la Senfino kaj Eterno, la freŝa, plaŭdanta malseko, en kiu estas tiel facila kaj songa la ŝvebo, simila al tio, kion Li ankoraŭ rememoras, de malproksime, — kiam alte, alte Li ŝvebis ankoraŭ, en la blua senlimo, en la proksimo de Luma Realo . . . Poste songo, la silenta cirkulado de la sango en Liaj vejnoj, kun la beko kaŝita sub siaj varmaj, dolĉaj flugiloj, egalritme spiretante, eterne.

Li venis sub la palisaro al la trinkvazo. Proksimume kvin staris jam tie: la bekojn per egalaj, maŝinaj movoj ili enŝovis, eltiris, suprentenis, por ke la akvo glutiĝu kaj ree enŝovis. Ankaŭ Li ekstaris inter ili: enigis la bekon, ensuĉis la akvon, posten svingis la kolon, glutis, denove enigis la bekon. Kiam Li ĝisgorĝe pleniĝis, Li kontente gagais kaj ekiris al la morusujo. Tiam venis tien Senflugila Gigantodio.

Nun rapide li venis per ledpiedoj, saltis inter ili. Li sciis, ke tiatempe oni devas forsalti, iom pli rapide meti la piedojn, disetendi la flugilojn, — poste, post kelkaj paŝoj, oni povas denove halti. Plej ofte li tiatempe ĵetas maizon — plej malbon-okaze, rapide li malaperas, oni povas reveni al la trinkvazo.

Ĉi okaze iom pli longe daŭras la afero. Senflugila Gigantodio impete saltas, kliniĝas, etendas la manojn post ilin. Eĉ post Lin mem. Li volas Lin kapti, ŝajnas, kiel la du Grasiĝintojn, en kiujn perforte oni ŝtopas la maizon. Tio ĉi ne estas al Li ŝata, faras Lin nervoza: la tuŝo kaj kaptito de la malmolaj, glataj kvin fingroj: foje Li jam estis inter tiuj fingroj, ili premis, palpis Lin, ankaŭ tiam Li frapis kaj protestis por sciigi tion al Gigantodio. Li ja ĝojis, kiam fine li komprenis kaj metis Lin sur la teron. Ŝajnas, ke denove pri tio temas — eble Gigantodio jam forgesis, ke Li ne ŝatas tion, al Li nur donu ankaŭ poste maizon, de malproksime, kaj la ceteron li konfidu al Li. Jen, nun li preskaŭ kaptis Lin, sed Li elglitis. Nun Blukapulo sekvas, — ha, li jam kaptis, levis ŝin, oni povas halti. Sed tamen ne — Blukapulo saltas el lia mano, Gigantodio kolere gagaas ion . . . eh, ankaŭ Blupiedulo ĝuste nun stumblas antaŭ Lia beko, nun Li ne povas forkuri . . . hop, oni kaptis Lian flugilon. Li volas elŝiri ĝin — Gigantodio denove ne komprenas, ne delasas Lin . . . eĉ, li pli forte Lin premas kaj levas en la aeron.

Eh, estas tede kaj ĝene. Gigantodio premas malantaŭen ambaŭ liajn flugilojn kaj jam denove palpas. Nun Liajn kropon kaj kolon. Estus bone, se li jam demetus Lin, jam doloras Liaj subbrakoj. Li penas al li komprenigi, ke ĉi tio ne estas bona, ke li eble erare Lin intermiksas kun kato, kiu ŝatas tiaĵojn. Sed nun pli longe daŭras la

afero . . . Gigantodio nun premas malantaŭen ankaŭ Lian kolon, tute malantaŭen, sur Lian dorson. Nun Li eĉ ne povas moviĝi, Li ne vidas Gigantodion, nur strion da ĉielo. Plej bone, se Li pacience atendas. Nu jes . . . sed Gigantodio ne lasas lin trankvila . . . ion li faras sur Lia kolo, ŝiras Liajn plumojn, ŝajnas . . . eh, ĉi tio jam estas tute malagrabla tikla, se li nur jam demetus Lin . . . sed ne, li preme tenas Lin, tre preme, jam doloras Lia fleksita kolo . . . kaj la alian manon, kiu estas libera, li svingas . . . kaj io longa, blindige brila estas en lia alia mano . . .

Ĉi tio estas tre stranga . . . tre malkomforta . . . kaj tre malbona . . . eh . . . kaj ĉi tio . . . ia eraro . . . ĉi tio brilega . . . ĝi ja ne konvenas tien, al Lia kolo . . . Li devus malfermi la bekon, rapide, rapide, antaŭenfleksi la kolon, komprenigi al tiu stulta Gigantodio, ke ĝi ne konvenas tien . . . rapide . . . sed Li ne povas . . .

Nu kaj . . . nu kaj ĉi tio . . . kio estas . . . io siblas . . . jen do, Li ja sciis, ke ĝi ne konvenas tien . . . ke tio fariĝos malbona . . .

Lia kolo . . . malfermiĝis Lia kolo . . . ne estas eble . . . ne estas en ordo . . . estas eraro . . . anstataŭ la beko . . . ne povas okazi . . . nun okazis terura, abomena neblaĵo . . . kaj io fluas . . . senorde, pulsante . . . eble la akvo, ĉu ne? kiun Li ensuĉis . . . kaj jes . . . kaj

Giganto . . . dio . . . dis . . . tenas Lian ko . . . la kolon . . .

Kaj fluas . . . kaj pulsas . . . kaj ŝprucas . . . plu . . . sed kiel . . . strange . . . ne estas vere . . . kaj nun . . . Giganto . . . dio . . . fine . . . delasis Lin . . . kaj Li jam estas . . . sur la tero . . . nun . . . nun . . . Li devas . . . rapide . . . forkuri . . .

Kaj kio estas . . . ĉi tiu ruĝo . . . ĉi tiu multa ruĝo . . . ĉi tiu multa ruĝo, kaj ne estas eble . . . forkuri . . . kvankam Gigantodio . . . jam delasis Lin . . . Kaj kio estas . . . jen . . . Blukapulo . . . ĉi tie bekas apud Li . . . ion . . . he, Blukapulo . . .

Li volis gagai al Blukapulo, sed mirante Li rimarkis, ke Li ne havas voĉon. Kaj samtempe estis ankaŭ alia strang-aĵo: la tuta korto ektorniĝis kaj malrapide ĝi komencis rondiri. Li ankoraŭ vidis Krestulon kaj Grandan Plumulon kaj vidis la palisaron, sed ĉio ĉi estis ridinde malklara . . . kaj la Luma Realo . . . ankaŭ la Luma Realo . . . neeble . . . fariĝis tia, kia la arĝenta Luno . . . arĝenta Luno en la mistera nokto, kiam senbrue ripozas la mondo kaj supre, supre en la alto ŝvebas . . . ŝvebas . . .

La lago . . . la junkoj . . . la akvo . . .

Tiam Lin kaptis kria konsterno: Li streĉis ĉiujn muskolojn, hirtigis ĉiujn plumojn, disetendis la piedojn kaj per terura fortostreĉo Li levis sian malfermitan kolon; en ununura, timigita, urĝanta, furioza decido de sia volo,

por ripari la Eraron. Sed la kolo ne obeis la volon kaj refalis kaj sterniĝis sur la tero.

Kaj la korton kaj la Blukapulon kaj la palisaron en tiu momento englutis la Senfina Spaco, kaj Luma Realo subite ekflagris kaj estingiĝis sur la ĉielo. Kaj Kosmo, la Universo ĉesis: por sentempaj tempoj, por eterna eter-no.

II.

Por tagmanĝo ni havis anasrostajon.

Ŝminko

Ankoraŭ iom da ruĝo ŝi disfrotis sur siaj lipoj, ŝminkis la okulojn per nigra kraĵono, forŝovis la buklojn de sia frunto kaj sin turnis antaŭ mi: la ŝaŭmfalbaloj trombis, la rubando flugis, la diamanto ekbrilis, la parfumo tremis.

”Ĉu mi estas bela?” demandis la du lipformaj farbostrioj, iomete disiĝinte, nur tiom, kiom permesis la fino de la strioj, kaj la pinte glatigitaj palpebroj suprenfrapiĝis.

Mirante mi ridetis.

”Bela,” mi diris poste, ĉar mi rememoris, ke per la sama mieno, per la sama turniĝo, sammaniere ŝi jam demandis ĉi tion, kaj kvazaŭ ni estus estintaj ankaŭ tiam en la samaj cirkonstancoj, — kaj ĉar mi memoris, ke tiam ŝi estis bela kaj dezirinda. Sed estis strange, ke ĉion ĉi mi memoris: la movon, per kiu ŝi levis al la buŝo la ŝminkstangeton kaj la kraĵonon — sed, kio estis intertempe, kie mi iris kaj kie ŝi iris, kaj kiu ŝi estis kaj kiu mi estis kaj kiel mi konis ŝin — pri tio mi jam nenion sciis. Mi eble nur legis ie pri ŝi aŭ vidis ŝin en la pinakoteko —

sed ne, ja ankaŭ la gusto kaj varmo de la sonĝo vibris en la fono de la memoro.

Kiam mi atingis la malsupron de la ŝtuparo, la gusto de ĉi tiu sonĝo inundis mian humoron — varmegaj fariĝis miaj okuloj, kaj miaj tempioj pulsas.

En la halo ŝi atingis min.

”Ĉu ni iros?” spiris Coty Lorigan. Kaj la parfuma pudro por momento ektiklis mian vizaĝon.

En la aŭto ŝi klinis sin sur mian bruston. Tiam mi jam sciis, kio estis la sonĝo: malsupre, laŭ la rivero, inter sovaĝfloroj, du tremantaj manoj, baraktantaj nudaj piedoj, stranga amara odoro kaj larĝe malfermitaj, ektimintaj okuloj. Kaprokorno! Granda Dio! kiel mi povis forgesi, kia jubila ĝojo, kia ridanta brilego, — esenco de herbo, arbo, aero, sunradio, ke tamen mi rememoris!

Ebrie mi balbutis ion . . . vi estas do, vi estas tiu?

La parfumo kaj falbalo flustre respondis kaj spiregis en mian oreton, narkote, sopire.

”Sinjorino Singer . . . ĉu vi vidis ŝin? sed ne estas vera diamanto . . . facile al ŝi . . . ili gajnis per ĝi . . . kaj ne ŝia edzo aĉetis ĝin . . . al mi diris Katrinjo . . . tiu blonda, en la krep-muslino . . . ŝia figuro estas bona . . . sed la piedoj estas grandaj . . .”

Tiel ŝi respondis, kaj flirtis parfumo kaj falbalo . . . Dum momento mi konsterniĝis . . . eh! eble mi ne bone

atentis, ke mi ne komprenas . . . poste, poste, tie supre . . .

La aŭto faris grandan turnon, ekskuiĝis, malrapidiĝis. Reflektoro trakaresis la bordon — jen ĝi estis, la rivereto: mi sentis la odoron de la sovaĝaj floroj. Plu!

En miaj brakoj mi portis ŝin supren sur la ŝtuparo, spiregante, per ŝvelantaj muskoloj. La pordo brufermiĝis, mi ankoraŭ aŭdis formorti en la korto la trenatajn paŝojn de la pordisto. Poste estiĝis silento — pordo, fenestro, fermitaj — kaj mi sola kun mia kaptaĵo. Sur la kanapo ŝi kuŝis, jam senparole, kun fermitaj okuloj.

La malgrandan lampon mi ekbruligis, poste mi proksimiĝis singarde. Mia projekto estis antaŭe kisi ŝin, mole kaj singarde tiel, okulfermintan. Sed la du ruĝaj strioj min ĝenis, mi reiris al la tualettableto kaj portis pecon da cervoledo por ilin defroti.

Facile ili defrotiĝis, sed sub ili mi ne trovis la molon de vivanta vizaĝo — tie troviĝis pli pala, sed pli malmola tavolo de farbo, postsigno de antaŭaj ŝminkoj. Jes, jen estis tio, mi memoris, antaŭ kelkaj monatoj, kiam unue mi vidis ŝin.

Pli grandan ledopecon mi alportis, kaj nun mi komencis froti la tutan vizaĝon, la okulojn kaj la delikatan, beltrajtan vizaĝon. Iom post iom cedis la farbomasko, mi surverŝis alkoholon, delikate: nun foriĝis la tuto. Pli

maldika vizaĝo restis sub ĝi, sed ankaŭ ĝi estis nur farbo, jes, mi rekonis la manon de la artisto.

Nun mi komencis jam furioze deŝiri ankaŭ tiun ĉi tavolon. La lampolumo vibris, mi jam apenaŭ vidis ion, nur la sentema palpo de miaj fingroj gvidis min. Denove foriĝanta tavolo, denove farbo. Mi ekkriegis kaj surverŝis la enhavon de la tuta botelo. Poste mi komencis knedi kaj froti kaj skrapi por atingi vivaĵon — la farbomasko dismoliĝis, cedis, disfluis inter miaj fingroj — miaj du manoj estis plenaj de kolora malseko, sur la du flankoj de la kanapo en dika rivereto ĝi komencis malrapide flueti. Subite mi sentis, ke mi knedas jam la veluron de la kanapo . . . Terurite mi kaptis la lampon kaj altenis ĝin.

La korpo kuŝis sur la kanapo, sed nenie troviĝis kapo. Dissolvita, malpura farbomakulo restis anstataŭ ĝi, kiun suĉe ensorbis la veluro de la kanapo. Mia gorĝo sekiĝis.

”Eh, kiom mi jam zorgu nun,” mi stertoris, ”la vizaĝo ja estis sen tio nur firmotabulo — mi volas ŝian korpon!”

Kaj per sola ekmovo mi fortiris la silkon, por avide kapti . . . Sed mi ne trovis sub ĝi cemizon: estis alia robo . . . jes, mi ĝin rekonis, en kiu ŝi pretersusuris min je la brako de tiu alia . . . Ankaŭ ĝin mi deŝiris . . . nun sekviz kostumo . . . jes, tiu, kiun ŝi ricevis de la bankiero. Sub la kostumo knabina, hela kaj flora batisto: ŝia patri-no ĝin aĉetis, kiam ŝi volis ŝin edzinigi . . . Meze mi

deŝiris ĝin . . . sub ĝi mi ja trovos ŝin? Kaj mi ŝovis la manon en la fendon . . . mola, silka aĵo trafis en mian manon — ŝire mi ĝin eltiris, estis punta vindaĵo, malplena, kun pendantaj rubandoj — la vindaĵo, en kiun oni ŝin metis, ĵus naskitan. Sed ŝi mem estis nenie, kaj sur la kanapo kuŝis ĉifitaj, distaŭzitaj ĉifonoj.

Korpa beleco

Je la dua tago post mia morto mi ricevis citleteron, ke mi aperu en la kontoro de la Transmonda Ĉiel-kompletiga Komandejo. Oni destinis mian lokon ie, kie kun pluraj aliaj ni atendis, ke oni transportu nin al Marso, aŭ kien ajn en la kvara dimensio. Mi tre enuis. Je la kvina tago mi renkontis mian amikon Desiderion, por kiu la sama loko estis destinita.

”Kiel vi fartas,” mi demandis, ”ĉu vi longe restos ĉi tie?”

”Mi ne scias. Mi tre enuas. Vi scias, oni malvigligas en la transmondo. Ne estas urĝaj aferoj, oni havas tempon por ĉio. La eterneco ja neniam elĉerpiĝas. Ĉu ankaŭ vin oni alcitis ĝis eternecfino?”

”Jes. Ĉu ĉi tie estas ĉiam tiel enue?”

”Jes, kaj oni perdas la tutan bonhumoron. Ekzemple antaŭhieraŭ venis en mian memoron, ke mi havas komision. Jam antaŭ mia alcito mi promesis al iu, al sinjorino, ke je la dua tago post mia morto, mi nokte vizitos ŝin. Do, ĉi tio venis en mian memoron, mi pensis, ke mi havas ja nenion por fari, mi malsupreniros, ni interparolos iomete.”

”Interese. Nu kaj kion ŝi diris?”

”Kelkajn minutojn antaŭ noktomezo mi alvenis, la sinjorina moŝto ankoraŭ dormis. Mi pensis, ke ŝi ja dormu, mi iris tra la muro, poste mi sidiĝis en la spegulo kaj mi rigardis ŝin. Laŭ multaj vidpunktoj preferinda estas ĉi tiu stato, ke oni ne havas korpon. Mia estis iom tro dika, kaj mi ofte ŝvitis. Tio ne ekzistas ĉi tie.”

”Kompreneble, vi estas prava.”

”Do, mi estis sufiĉe scivola pri la renkonto. Nome, mi skribis al ŝi longan kaj patosan leteron, en kiu mi promesis al ŝi ĉi tiun rendevuon. Mi skribis, ke ni renkontiĝos en la transa mondo.”

Desiderio meditis.

”Nun mi ne komprenas, kial mi volis renkonti ŝin ĝuste en la transa mondo. Ŝajne mi havis ion gravan por diri al ŝi, sed, je Dio, mi forgesis ĝin. Mi sidis tie, en ŝia ĉambro, kaj rompis al mi la kapon, kion do mi volis diri al ŝi. Kvankam, kiel urĝa estis por mi ĉi tiu renkontiĝo, mi mortpafis min nur por renkonti ŝin. Kaj pensu, mi estas tie, kaj nenio venas en mian kapon.”

Denove li meditis.

”Ĉu bela virino?” mi demandis fine.

Desiderio levis la ŝultrojn.

”Dio nur scias! Antaŭe ŝi tre plaĉis al mi. Nun mi rigardis ŝin pli bone, dum ŝi dormis. Diru sincere, ĉu dum

via ĉi tiea restado ne venis en vian kapon, kiel stranga afero estas la homa korpo?”

”Ĉu stranga?”

”Nu, jes. Mi povus diri: komika. Al mi faris strangan efikon tio, ke jen, ĉi tiuj homoj ĉiam ankoraŭ portas la korpon, kiun mi de longe ne plu portas. Ĉi tio estas ia . . . ia . . . elmodiĝinta afero . . . Kiel eluzitaj vestoj de sinjoroj. La animo demetas la veston, kaj ĉi tiuj portas ĝin plu . . .”

”Kaŝas sin io en la afero. Sed la detaloj . . .”

”Do, aŭskultu, ankaŭ tiujn mi rigardis. Ekzemple, antaŭe mi estis freneze enamiĝinta al ŝiaj piedoj. Sed mi petas vin, eh, mi petas vin, kiel aspektas tia homa piedo. Ĝi estas evidente kvazaŭ kripliĝinta mano. Antaŭe ĝi ja estis mano, kiam la homo estis simio. La fingroj senformiĝis, la manplato farigis dika, senforma karnŝvelaĵo. Mi vere ne komprenis, ke tion mi antaŭe ne rimarkis.”

”Kaj ŝia buŝo?”

”Ĝi estas du ruĝaj karnkolbasoj. Supra aperturo de la intestsistemo, ŝveliĝinta pro la multa manĝo. Interne estas ostetoj, sed ankaŭ tiuj ne havas regulan formon. Poste la nazo . . . ! Nu, aŭdu! ĉu povas ekzisti io pli senforma: ĝi havas du truojn. Sed plej komikaj, plej mizeraj estas la du oreloj. Ke tio neniam venis en mian kapon! Du malevoluintaj, plorindaj karnfranĝoj, kiuj ŝrumpis kaj kunfaldiĝis, kvazaŭ rostita lardo. Kaj du tiaj fran-

ĝoj pendas ĉe la du flankoj de la kapo, kaj ili plaĉis al mi! kaj mi volis kisi ilin! Brrr!”

”Strange, strange. Estas io prava en via parolo.”

”Kaj mi rigardis ŝin iom da tempo. Same tia estas la tuto. Poste denove mi rompis al mi la kapon, kial mi volis renkonti ŝin. Poste, ĉu honte, ĉu ne honte, mi ne povis rememori, do mi kaptis min, kaj bele, silente mi forportis min, antaŭ ol ŝi vekigis. — Mi ne reirus plu, eĉ se oni promesus al mi . . . mi ne scias, kion.”

”De tiam vi tute ne rememoris ŝin!”

”Kion fari, Ne! Sed mi tute ne streĉas min, mi havas ja tempon. Por tio ja estas la eterneco. Ĉu vi havas cigaredon?”

”Mi havas, sed kiel fumi, se ni ne havas buŝon?”

”Vere. Vidu, jen la sola afero, kiun mi bedaŭras.”

www.omnibus./inko

ISBN 91-7303-186-0